— Mi opinias, ke estis por mi tre bona transakcio, ĉar dank' al la kontanta pago mi havis tre grandan rabaton (= Νομίζω πως ήταν για μένα πολύ καλή συναλλαγή, γιατί χάρη στη μετρητοίς πληρωμή είχα πολύ μεγάλη έκπτωση).
— Mi neniam aĉetas ion kredite, por ne pagi pli altajn prezojn (= Ποτέ δεν αγοράζω κάτι με πίστωση, για να μην πληρώνω πιο μεγάλες τιμές).

προκαταβάλλω = **ekpagi**
προπληρώνω = **antaŭpagi**
συμβόλαιο, συμφωνητικό = **kontrakto**
εξοφλώ, αποπληρώνω = **elpagi**
οφείλω, χρωστάω = **ŝuldi**
δανεικά = **prunte**
δανείζω = **alprunti, pruntedoni**
δανείζομαι = **deprunti, pruntepreni**

— Por la aĉetado de mia apartamento mi faris kontrakton, laŭ kiu mi devas tuj ekpagi la duonon de la prezo, kaj elpagi la reston en dek ok monatoj (= Για την αγορά του διαμερίσματός μου έκανα συμβόλαιο, σύμφωνα με το οποίο πρέπει αμέσως να

προκαταβάλλω το μισό της τιμής και να εξοφλήσω το υπόλοιπο σε δέκαοκτώ μήνες).

— Ĉu vi havos rabaton por tiu ĉi ekpago? (= Θα έχεις έκπτωση γι' αυτή την προκαταβολή;).
— Ĉe la mendo de mia aŭtomobilo mi aŭtaŭpagis la tutan sumon (= Με την παραγγελία του αυτοκινήτου μου προπλήρωσα όλο το ποσό).
— Antaŭ longe mi deziris aĉeti aŭtomobilon, tamen mi ne decidis fari tion, antaŭ ol kolekti la tutan monon (= Από μακρού επιθυμούσα να αγοράσω αυτοκίνητο, όμως δεν αποφάσισα να το κάνω πριν μαζέψω όλα τα χρήματα).
— Mi ne depruntis de via frato, ĉar mi ne volas havi ŝuldojn (= Δεν δανείστηκα από τον αδελφό σου, γιατί δε θέλω να έχω χρέη).

προμήθεια = **provizio**
ποσοστό = **procentaĵo**
ασφαλίζω = **asekuri**
αξία = **valoro**

— Vi aldonu al la tuta prezo ankaŭ mian provizion (= Πρόσθεσε στην όλη τιμή επίσης την προμήθειά μου).
— La provizio de la peranto estas malalta procentaĵo sur la vendoprezo de la nemoveblaĵo (= Η προμήθεια του μεσάζοντα είναι μικρό ποσοστό στην τιμή πώλησης του ακινήτου).
— Mi asekuris mian domon kontraŭ incendio (= Ασφάλισα το σπίτι μου κατά πυρκαγιάς).
— Estus pli bone, se vi asekurus ĝin kontraŭ ĉia risko, eĉ por sumo supera al ĝia valoro (= Θα ήταν καλύτερα αν το ασφάλιζες έναντι [κατά] κάθε κινδύνου, και μάλιστα για ποσό ανώτερο της αξίας του).

λογαριασμός (στην Τράπεζα-λογιστικός) = **konto**
χρέωση (λογιστική) = **debeto**
πίστωση (λογιστική) = **kredito**
υπόλοιπο (λογαριασμού) = **saldo**
επιταγή = **ĉeko**
γραμμάτιο = **bilo**
καταθέτω (χρήματα) = **deponi**
κάνω ανάληψη (χρημάτων) = **retrati**

— Mi malfermis konton ĉe la banko (= Άνοιξα λογαριασμό στην Τράπεζα).

— Via konto ĉe ni estas ankoraŭ debeta (= Ο λογαριασμός σου σε μας είναι ακόμα χρεωστικός).
— Lia konto prezentas kreditan saldon el dek mil drakmoj (= Ο λογαριασμός του παρουσιάζει πιστωτικό υπόλοιπο δέκα χιλιάδων δραχμών).
— Mi pagis kontante per banka ĉeko (= Πλήρωσα μετρητοίς με Τραπεζική επιταγή).
— Por la pago de mia ŝuldo mi estis devigita subskribi tri bilojn (= Για την πληρωμή του χρέους μου υποχρεώθηκα να υπογράψω τρία γραμμάτια).
— Mi deponis la tutan sumon en mia banka konto (= Κατάθεσα όλο το ποσό στον Τραπεζικό λογαριασμό μου).
— Mi retratis el mia konto kvindek mil drakmojn, sed restas ankoraŭ granda saldo (= Τράβηξα από το λογαριασμό μου πενήντα χιλιάδες δραχμές, αλλά μένει ακόμα μεγάλο υπόλοιπο).

λογαριάζω = **kalkuli**
απόδειξη (γενικά) = **kvitanco**
απόδειξη πληρωμής = **pagatesto**
απόδειξη παραλαβής = **ricevatesto**
λαμβάνω, παραλαμβάνω = **ricevi**
παραδίνω = **liveri**

— Ĉu vi bone kalkulis kiom ni devas pagi? (= Λογάριασες καλά πόσο πρέπει να πληρώσουμε;).
— Petu de la kelnero la kalkulon (= Ζήτα από τον σερβιτόρο το λογαριασμό).
— Tiu ĉi kalkulo estas malĝusta kaj la kvitanco prezentas alian sumon (= Αυτός εδώ ο λογαριασμός είναι λανθασμένος, και η απόδειξη δείχνει άλλο ποσό).
— Mi liveris la komercaĵon, sed oni ne donis al mi kvitancon, ĉu oni ne devis doni al mi ricevateston? (= Παράδωσα το εμπόρευμα, αλλά δεν μου έδωσαν απόδειξη, δεν έπρεπε να μου δώσουν απόδειξη παραλαβής;).
— Certe jes, oni ankaŭ devis doni al vi pagateston por via pago (= Ασφαλώς ναι, επίσης έπρεπε να σου δώσουν απόδειξη πληρωμής για την πληρωμή σου).

συναλλαγή, τζίρος = **spezo**
εισπράτω = **enspezi** (έσοδο = **enspezo**)
ξοδεύω = **elspezi** (έξοδο = **elspezo**)

— La ĉiutaga spezo de tiu entrepreno atingas altajn sumojn (= Ο καθημερινός τζίρος αυτής της Επιχείρησης φτάνει σε μεγάλα ποσά).
— Vi enskribu sur unu paĝo la enspezojn kaj sur alia la elspezojn (= Να καταχωρείς σε μια σελίδα τα έσοδα και σε άλλη τα έξοδα).
— Viaj elspezoj ne superu viajn enspezojn (= Τα έξοδά σου να μην υπερβαίνουν τα έσοδά σου).
— Tiu virino multon elspezas por koketaĵoj (= Αυτή η γυναίκα ξοδεύει πολλά για λούσα).
— Bedaŭrinde miaj enspezoj ne permesas al mi elspezi tiom da mono, por nur mia lupago (= Δυστυχώς τα έσοδά μου δεν μου επιτρέπουν να ξοδεύω τόσα λεφτά για μόνο το νοίκι μου).

συνάλλαγμα = **valuto**
διαβατήριο = **pasporto**

— Mi ricevis de la banko valuton el du mil markoj (= Πήρα από την Τράπεζα συνάλλαγμα δύο χιλιάδων μάρκων).
— Por vojaĝi al Italujo mi bezonas valuton en liroj (= Για να ταξιδέψω στην Ιταλία χρειάζομαι συνάλλαγμα σε λιρέττες).
— Ne sufiĉas pasporto por vojaĝi al eksterlando, oni bezonas ankaŭ valuton (= Δεν αρκεί το διαβατήριο για να ταξιδέψεις στο εξωτερικό, χρειάζεται κανείς επίσης συνάλλαγμα).

φόρος = **imposto**
εισόδημα = **rento**
επί πλέον πληρωμή, επιβάρυνση } = **krompago**

— Oni devas pagi ĝustatempe sian imposton por eviti krompagon (= Πρέπει κανείς να πληρώνει έγκαιρα το φόρο του, για να αποφύγει επιβάρυνση).
— Ĉi-jare mi pagos altan imposton, ĉar miaj rentoj estis tre altaj (= Φέτος θα πληρώσω μεγάλο φόρο, γιατί τα εισοδήματά μου ήταν πολύ μεγάλα).
— Oni devas pagi imposton laŭ siaj enspezoj (= Πρέπει κανείς να πληρώνει φόρο σύμφωνα με τα έσοδά του).
— Oni metis imposton sur la aŭtomobiloj (= Έβαλαν φόρο στα αυτοκίνητα).
— Kial ni pagu tiom da nerekraj impostoj? Ĉu ne sufiĉas nia tiom alta rekta imposto? (= Γιατί να πληρώνουμε τόσους έμμεσους φόρους; Δεν αρκεί ο τόσο ψηλός άμεσος φόρος μας;).

ΝΟΜΙΣΜΑΤΑ (MONUNUOJ)

● Τα ονόματα των κυριότερων νομισμάτων του κόσμου μας, στην Εσπεράντο, είναι:

— **drakmo** ή **draĥmo** = δραχμή.
— **dinaro** = δηνάριο (Γιουγκοσλαβία, Αλγερία, Ιρακ, Λιβύη, Τυνησία, Ιορδανία κ.ά.).
— **dolaro** = δολάριο (Η.Π.Α., Καναδάς, Ν. Ζηλανδία, Λιβερία, Χογκ-Κογκ, Ταϊβάν κ.ά.).
— **franko** = φράγκο (Γαλλία, Βέλγιο, Ελβετία, Λουξεμβούργο, Καμερούν, Γκαμπόν κ.ά.).
— **guldeno** ή **floreno** = φλορίνι (Ολλανδία).
— **jeno** ή **eno** = γιέν (Ιαπωνία).
— **krono** = κορώνα (Δανία, Σουηδία, Νορβηγία, Τσεχοσλοβακία κ.ά.).
— **kruzejro** = κρουζέιρο (Βραζιλία).
— **levo** = λέβα (Βουλγαρία).
— **liro** = λιρέττα (Ιταλία).
— **marko** = μάρκο (Ομοσπ. Γερμανία, Λαοκρ. Δημ. Γερμανίας, Φινλανδία κ.ά.).
— **peso** = πέσο (Βολιβία, Χιλή, Μεξικό, Κούβα, Ουρουγουάη, Κολομβία κ.ά.).
— **peseto** = πεσέτα (Ισπανία).
— **pundo** = λίρα (Βρετανία, Ιρλανδία, Κύπρος, Αίγυπτος, Τουρκία, Σουδάν κ.ά.).
— **rublo** = ρούβλι (Σοβ. Ένωση).
— **rupio** = ρουπία (Ινδία, Πακιστάν, Σρι Λάνκα, Ινδονησία κ.ά.).
— **sterlingo** = στερλίνα (λίρα Βρετανίας).
— **zloto** = ζλότι (Πολωνία).

ΓΝΩΣΤΕΣ — ΑΓΝΩΣΤΕΣ ΛΕΞΕΙΣ
(συνέχεια από το προηγούμενο μάθημα)

galaksio = γαλαξίας
galero = γαλέρα
galvanizi = γαλβανίζω
ganglio = γάγγλιο
garnituro = γαρνιτούρα
gastronomo = γαστρονόμος (**-io** = γαστρονομία)
gazo = γάζα
gazelo = γαζέλλα
gazono = γκαζόν, χλοοτάπητας
genealogo = Γενεαλόγος (**-io** = γενεαλογία)
genetiko = Γεννετική
geofiziko = Γεωφυσική
geografo = Γεωγράφος (**-io** = Γεωγραφία)
geologo = Γεωλόγος (**-io** = Γεωλογία)
geometro = Γεωμέτρης (**-io** = Γεωμετρία)
geranio = γεράνι
giganto = γίγαντας
gimnazio = Γυμνάσιο
ginekologo = Γυναικολόγος (**-io** = Γυναικολογία)
gipaeto = γυπαετός
gipso = γύψος
girlando = γιρλάντα
glaŭkomo = γλαύκωμα
globo = σφαίρα, γλόμπος
Golgoto = Γολγοθάς
gondolo = γόνδολα
grafito = γραφίτης
grafologo = Γραφολόγος (**-io** = Γραφολογία)
gramatiko = Γραμματική
granito = γρανίτης
grimaco = γριμάτσα, μορφασμός
ĝazo = τζαζ (μουσ.)
ĝentlemano = τζέντλεμαν

LEKSIKO

anonci = αναγγέλω
beni = ευλογώ
drinki = πίνω οινοπνευματώδη, μεθοκοπώ
eksplodi = εκρύγνομαι
evento = συμβάν
fajfi = σφυρίζω
farbi = βάφω
funebro = πένθος
grandioza = μεγαλοπρεπής μεγαλειώδης
gvidi = οδηγώ, καθοδηγώ
guti = στάζω
heziti = διστάζω
hirundo = χελιδόνι
honori = τιμώ
intelekto = διάνοια
kandelo = κερί
konkeri = κατακτώ
korto = αυλή
laŭdi = επαινώ
literaturo = λογοτεχνία

materialo = υλικό
mejlo = μίλι
meso = λειτουργία (θρησκευτική)
nesto = φωληά
pastro = παπάς
perfekta = άριστος, τέλειος
raketo = πύραυλος, ρουκέτα
raŭka = βραχνός
resurekti = ανασταίνομαι
rezulti = προκύπτω
ripari = επιδιορθώνω, επισκευάζω
sata = χορτάτος
sojlo = κατώφλι
sekso = φύλο
solidara = αλληλέγγυος
sonori = ηχώ, σημαίνω
speco = είδος
ŝafo = αρνί
tombo = τάφος
trezoro = θησαυρός

TEKSTO

La dua plej granda kristana festo estas Pasko.

Kiel sciate tiu ĉi festo estas ĉiam en printempo. Tiel, plej ofte, la tuta familio Georgopulos pasigas la Paskajn festotagojn en la vilaĝo de sinjoro Vasilis, ĉe la onklo Janis.

En la vilaĝo, ĉio, dum la festaj tagoj de Granda Semajno[1], havas sian specialan koloron, tian, kian oni ne povas ĝui en la grandaj urboj.

La ĉiutagaj mesoj en la malgranda preĝejo de la vilaĝo, en kiuj ĉeestas ĉiuj vilaĝanoj, estas vere belaj.

Oni devas scii, ke ĉiuj samvilaĝanoj estas inter si ne nur konatoj, sed bonaj amikoj. En tiu malgranda socio regas ĉiam plena harmonio, akordo kaj solidareco. Feliĉa evento ĉe unu familio, kiel povas esti naskiĝo, edziĝo k.a., donas veran ĝojon al la tuta vilaĝo, dum malfeliĉa okazaĵo plenigas je malĝojo kaj funebro ĉiujn domojn de la vilaĝo.

Tiel ĉiu vilaĝano bone scias, ke li neniam estas sola, ĉar liaj problemoj, same kiel liaj ĝojoj, estas afero de ĉiuj siaj samvilaĝanoj.

Laŭ tiu kutimo do, ĉio koncernanta la tutan vilaĝon, estas afero de ĉiuj vilaĝanoj.

Longan tempon antaŭ la granda festo de Pasko, la vilaĝanoj, en plena kunlaboro, preparas ĉion, oferante, ĉiu el ili, laŭ sia talento, tion, kion li povas.

En tiu ĉi okazo, kompreneble, la tutan aferon gvidas la pastro de la vilaĝo, la maljuna sinjoro Tomas. La antaŭtagojn de Sankta Semajno[1] ĉio estas tute preta.

La malgranda, malnova preĝejo estas tute blanke farbita, ĉio en la

1. Φυσικά με κεφαλαίο και χωρίς άρθρο, αφού πρόκειται για ονόματα εορτών (Μεγάλη Εβδομάδα, Μεγάλη Παρασκευή, Μεγάλο Σαββάτο κ.λπ.).

granda placo, antaŭ la preĝejo, estas riparita, la stratoj, la domoj, ĉio en la plej bona stato, tute pura, atendas la grandan feston.

Ĉiuj kunlaboras kaj kune penas, por ke ĉio estu perfekte aranĝita kaj organizita, ĉar dum la paskaj festoj multaj gastoj venas en la vilaĝon.

Plejparte ili estas parencoj de vilaĝanoj, kiuj loĝas nun malproksime de la vilaĝo.

La onklo Janis diras, ke ili estas la hirundoj de la vilaĝo, kiuj revenas en siajn nestojn.

Alia ĉiujare grupo da virinoj prenas sur sin la taskon konstrui per floroj la «sanktan tombon[2]» de Kristo, kiun oni trapasigas la vesperon de Granda Vendredo[1], tra ĉiuj stratoj kaj hejmoj de la vilaĝo.

Ĉiu grupo klopodas fari la «tombon[2]» pli bela ol la pasintjara, uzante kiel solan materialon la plej belajn, multkolorajn florojn, kolektitajn de la gejunuloj de la vilaĝo.

Ĉiujare la rezulto[3] estas mirinda kaj kaŭzas la laŭdojn kaj benojn de la maljuna pastro.

La nokton de Granda Sabato[1] la tuta vilaĝo ĉeestas en la solena meso pri la resurekto de Kristo, okazanta en la placo de la vilaĝo.

Ĝuste la noktomezon, kiam la raŭka voĉo de la pastro anoncas, ke «Kristo resurektis», la sonoriloj[4] de la preĝejo komencas sonori[4], kaj la vilaĝanoj ekbruligas siajn kandelojn, kaj komencas gaje interŝanĝi bondezirojn.

La infanoj, tute pretaj kaj ĉiam senpaciencaj, tuj ekbruligas raketojn kaj aliajn similajn bruilojn, kiuj elĵetiĝas supren kaj eksplodas en la aero, lumigante per diverskoloraj fajreroj la noktan ĉielon, kaj kaŭzante grandan bruon.

Kvazaŭ tio ne sufiĉus, la infanoj, per diversspecaj fajfiloj, konkurante unu kun la alia, penas kaŭzi kiel eble plej grandan bruon, tute forgesante la konsilojn de la pastro kaj la instruisto, laŭ kiuj, tiun fojon ili nepre devus esti pli trankvilaj ol pasintjare.

En ĉiu domo de la vilaĝo sekvas solena festeno, en kiu, kompreneble,

---

2. Η έκφραση «**sankta tombo**» (= άγιος τάφος) χρησιμοποιείται μεταφορικά για να αποδώσει αυτό που στα Ελληνικά λέμε «επιτάφιος». Η λέξη «**epitafo**», στην Εσπεράντο σημαίνει μόνο «επιγραφή μνήματος».

3. Το ρήμα «**rezulti**» σημαίνει προκύπτω. Επομένως το ουσιαστικό «**rezulto**» σημαίνει «αυτό που προκύπτει», δηλαδή «αποτέλεσμα». Η έννοια αυτή (αποτέλεσμα) αποδίδεται και από άλλη ανεξάρτητη λέξη, την «**rezultato**».

4. Το ρήμα «**sonori**» σημαίνει «σημαίνω» δηλαδή «ηχώ» (προκαλώ ήχο που διαρκεί). Έτσι «**sonorilo**» σημαίνει «σήμαντρο» (καμπάνα).

ĉiuj, sufiĉe malsataj[5] jam, post semajna fastado, unue gustumas la tradician «magirica».

La familio Georgopulos havas ankoraŭfoje la okazon ĝui la kuirarton de la dommastrino, la onklino Aleksandra.

La tagon de Pasko, en ĉiu korto de la vilaĝo, de la frua mateno estas jam preta la fajro, sur kiu estos rostita per trapikilo, laŭ la kutimo, la paska ŝafo.

La rostado de la ŝafo estas vera ceremonio, kiun partoprenas la tuta familio.

De la mateno ĝis la frua posttagmezo, ĉiuj domoj estas malfermitaj al la sennombraj vizitantoj.

Ĉiuj vilaĝanoj devas viziti unu la alian, almenaŭ por kelkaj minutoj, kiom oni bezonas por interfrapi la ruĝajn ovojn, gustumi la regalaĵon de la dommastro, trinki glason da vino kaj esprimi siajn bondezirojn.

Amatoraj orkestro kaj ĥoro, konsistantaj el la plej letraj, ĉiaaĝaj kaj ĉiaseksaj[6] «muzikistoj» kaj «kantistoj» de la vilaĝo, (inter ili estas ankaŭ sinjoro Vasilis kaj Kostas), vizitas laŭvice ĉiun domon de la vilaĝo, ludas kaj kantas ĉe ĉiu sojlo, honore al la dommastroj.

En la vespero la festo fariĝas tute komuna, ĉar ĉiuj vilaĝanoj kolektiĝas en la placo de la vilaĝo, kie estas starigitaj longaj vicoj da tabloj, provizitaj per manĝaĵoj, kiujn alportas ĉiuj dommastrinoj, por la komuna festeno.

Sub la gajaj sonoj de la nelacigebla orkestro, la gejunuloj de la vilaĝo montras sian danclertecon, kaj la grandaĝuloj sian drinkkapablon.

EKSPLIKOJ

pasintjara = tiu de la pasinta jaro
bruiloj = iloj kaŭzantaj bruon
interfrapi = frapi inter si

---

5. Το επίθετο «**sata**» σημαίνει «χορτάτος». Έτσι «**sati**» (= είμαι χορτάτος), «**satiĝi**» (= χορταίνω), «**malsati**» (= πεινάω).

6. Το ουσιαστικό «**sekso**» σημαίνει «φύλο». Σε αντίθεση με άλλες λατινογενείς Γλώσσες, αλλά και την Ελληνική, που έχει υιοθετήσει αυτή τη λέξη (σεξ), στην Εσπεράντο το ουσιαστικό αυτό δεν δηλώνει ούτε μεταφορικά την ερωτική, σαρκική συνάντηση. Εν τούτοις το επίθετο «**seksa**» χρησιμοποιείται με την ίδια ακριβώς σημασία όπως η αντίστοιχη Ελληνική (;) λέξη «σεξουαλικός» (**seksa** vivo, problemo, konduto, rilato = σεξουαλική ζωή, πρόβλημα, συμπεριφορά, σχέση κ.λπ.). Το ίδιο συμβαίνει με κάθε παράγωγη λέξη αυτής της ρίζας, όπως: «**sekseco**» (= σεξουαλικότητα), «**seksema**» (= σεξομανής επιρρεπής στο σεξ), «**seksumi**» (= συνουσιάζομαι), «**seksologo**» (= σεξολόγος), «**ambaŭseksa**» (= αμφισεξουαλικός), «**samseksamulo**» (= ομοφυλόφιλος) κ.λπ.

EKZERCOJ

a) Vi respondu al la sekvantaj demandoj, nepre uzante plenajn frazojn:

1) Kion specialan havas la festaj tagoj en la vilaĝo?
2) Kio regas en la malgranda socio de la vilaĝo?
3) Kion la vilaĝanoj scias rilate al siaj problemoj?
4) Kiu gvidas la laborojn pri la preparado de la festo?
5) Por kio la vilaĝanoj penas, kaj kial ili faras tion?
6) Kion la onklo Janis diras pri la gastoj?
7) Pri kio la vilaĝaninoj sin okupas, kaj kion ili celas?
8) Kio okazas en la placo de la vilaĝo la nokton de Granda Sabato?
9) Kion la infanoj faras la noktomezon de Granda Sabato?
10) Kion la vilaĝanoj faras en siaj kortoj la tagon de Pasko?

b) En la sekvantaj demandoj-respondoj vi traduku ĉiun grekan tekston en Esperanton kaj ĉiun Esperantan tekston en la grekan:

— Ni revenu al nia diskutado. Vi diris al mi, ke Esperanto ludas gravan rolon en la protektado de la naciaj lingvoj. Ĉu vi povus ekspliki al mi tion?
— Jes. Estas kompreneble, ke la deviga uzado de fremdaj naciaj lingvoj, en iu lando, malbone influas la evoluon de ĝia propra lingvo. La pli evoluintaj landoj, pli ĝuste la ekonomie pli fortaj, eksportas al la pli malriĉaj landoj ne nur siajn produktaĵojn, teknologion kaj ĉiaspecajn servojn, sed ankaŭ sian lingvon kaj kulturon. Tiel, la lingvo kaj kulturo de la akceptantoj, devige influiĝas kaj falsiĝas.

— Αυτό που λέτε τώρα είναι πολύ σοβαρό. Μπορείτε να το εξηγήσετε πιο καθαρά;
— Βεβαίως ναι. Όπως στα παληά χρόνια (παληό καιρό) οι πιο αδύνατοι λαοί υποχρεώνονταν να δεχθούν την πολιτιστική (της κουλτούρας), και επομένως τη Γλωσσική επιβολή των ισχυρών κατακτητών τους, έτσι και σήμερα η οικονομική «κατάκτηση», που οι δυνατές χώρες ασκούν (εφαρμόζουν) σε βάρος των πιο αδύναμων, έχουν πολλά δυσάρεστα επακόλουθα. Ένα από αυτά είναι η νόθευση του πολιτιστικού και Γλωσσικού χαρακτήρα της «κατακτημένης χώρας».

— Ĉu vi povas doni ekzemplon?
— Certe. Vi rigardu, kio okazas en nia propra lando. Ĉu vi pensis iam, kiom da fremdaj vortoj eniĝis en la grekan lingvon?
Estas ne nur vortoj turkaj, sed ankaŭ francaj, anglaj, eĉ italaj kaj aliaj. Vi rigardu, kio okazas en la landoj de la suda Ameriko. Kie kaj kiom

vaste estas uzataj la lingvoj de la antikvaj popoloj, kiuj konstruis tiom grandiozajn civilizaciojn?
Kio okazas en Aŭstralio, kio en Afriko? Mi diros al vi ankaŭ la jenon: Ĉu vi scias eĉ unu lernejon en fremda lando, en kiu estas devige instruata la greka lingvo, aŭ la bulgara, aŭ la rumana, aŭ la islanda, aŭ la dana? Ĉu vi pensis, kial la angla lernanto tute ne bezonas lerni la grekan? Kial la rusaj, la francaj, la germanaj lernantoj tute ne bezonas lerni la grekan, la danan, la rumanan lingvojn? Tamen la Grekoj, la Rumanoj, la Finnoj, la Islandanoj k.a. devas lerni en siaj lernejoj, eĉ devige, la anglan, aŭ la francan, aŭ la germanan, aŭ la rusan. Kial tio okazas? Estas evidente, ke ili bezonas tion, ĉar iliaj landoj estas ekonomie pli malfortaj ol la anglalingvaj, franclingvaj, ruslingvaj kaj aliaj landoj. Tio tamen certe influas kaj falsas iliajn proprajn kulturon kaj lingvon. Ĉu ne estas tiel?

– Συμφωνώ ότι η οικονομική εξάρτηση αναγκάζει τις μικρές χώρες να δέχονται την ξένη επιρροή στην κουλτούρα και τη Γλώσσα τους. Και νομίζω τα επιχειρήματά σας υπέρ της διεθνούς Γλώσσας πολύ πειστικά.
Μήπως επιθυμείτε να προσθέσετε ακόμα κάτι;
– Ναι. Μπορώ ακόμα να πω ότι η διάδοση της Εσπεράντο σε όλο τον κόσμο, όχι μόνο θα σώσει τις εθνικές Γλώσσες και κουλτούρες, αλλά θα βοηθήσει στην απεριόριστη διάδοση των ιδεών, των γνώσεων, της κουλτούρας κάθε λαού, σε όλο τον κόσμο μας.

— Ĉu vi povas ekspliki tion?
— Certe. Vi imagu, kio okazos, kiam ĉiuj popoloj sur nia tero povos uzi krom sia propra lingvo ankaŭ la internacian. Tiam ĉiu homo en nia mondo povos tute facile kaj libere ĝui la fruktojn de la homa intelekto.
Kiom da ĉiaspecaj verkoj de japanaj, ĉinaj, koreaj, peruaj, kenjaj k.a. verkistoj vi jam legis?
Ĉu vi ne scias, kiom da trezoroj estas kaŝitaj en la historio, la tradicio, la kulturo, la scienco, la literaturo de tiuj ĉi popoloj? Tamen vi tute ne povas konatiĝi kun la trezoroj de tiuj popoloj, ĉar, kompreneble, ili ne povas esti tradukitaj en ĉiujn fremdajn lingvojn.

— Μη το λέτε αυτό. Είναι γνωστό ότι κάθε μεγάλος συγγραφέας, διάσημος στην πατρίδα του, μεταφράζεται σε πολλές ξένες Γλώσσες και γίνεται αμέσως γνωστός σ' όλο τον κόσμο.
— Σ' όλο τον κόσμο; Σε πόσο πολλές Γλώσσες μεταφράζεται ένας τέτοιος, διάσημος στη χώρα του συγγραφέας; Σε δύο, σε τρεις, σε πέντε;

Όμως αυτές οι δύο, τρεις ή πέντε Γλώσσες χρησιμοποιούνται μόνο σε (ένα) πολύ μικρό μέρος του κόσμου μας, από πολύ μικρό αριθμό ανθρώπων. Είναι λοιπόν σταγόνα στον ωκεανό. Ξέρετε ότι στον κόσμο μας χρησιμοποιούνται χιλιάδες Γλώσσες, από πάρα πολλά εκατομύρια ανθρώπους, που είναι εντελώς ξένοι σ' αυτές τις τρεις, ή πέντε Γλώσσες.

— Mi konfesas, ke vi pravas. Mi, kiel Eŭropano, alkutimiĝis al la erara ideo, ke Eŭropo estas preskaŭ la tuta nia mondo. Tamen mi nun pensas, ke ankaŭ en nia kontinento, malgranda parto de nia mondo, estas uzataj tiom da lingvoj! Vi tre ĝuste pensas pri la tuta homaro, pri la vere tuta nia mondo, kies la plej granda parto restas por ni preskaŭ tute nekonata. Mi ja konfesas tion.

Vi nun respondu al mi tute sincere. Ĉu vi vere kredas, ke venos iam la tempo, kiam Esperanto estos uzata en la tuta mondo, kiel dua lingvo de ĉiuj popoloj? Ĉu vi vere kredas, ke viaj esperoj nepre efektiviĝos?

— Jes. Mi povas tute sincere vin certigi, ke venos iam tiu tempo. Mi kredas, ke tiuj ĉi esperoj nepre efektiviĝos, ĉar mi kredas al la homoj. Mi bone scias, ke Esperanto estas tute necesa, kaj mi ankaŭ scias bone, ke tiu ĉi ideo estas tute konvena al la homa naturo. Mi ne povas diri, ke tiu tempo venos baldaŭ aŭ ne, tamen ĝi nepre venos. Vi ne forgesu, ke eĉ la vojaĝo de cent mil mejloj komenciĝas per la unua paŝo. Mi certigas vin, ke la unuaj paŝoj jam fariĝis. La daŭrigo dependas de ni, kaj mi kredas, ke tiu ĉi afero meritas nian tutan fervoron kaj amon.

c) Krucvorto

Horizontale

1. Χρέωση
2. Κάνω ανάληψη χρημάτων
3. Ποσό
4. Φτηνός / Κόστος
5. Απόδειξη πληρωμής (αιτ.)
6. Αγορά / Πληρώνω
7. Τιμή
8. Συνάλλαγμα / Ασφάλεια
9. Ρούβλι
10. Παραδίνω
11. Εισόδημα
12. Προμήθεια
13. Δολάριο / Λιρέττα / Παραγγέλνω



Vertikale

1. Πεσέτα / Επιταγή / Ρουπία
2. Αξία
3. Επί πλέον πληρωμή
4. Δανείζω, δανείζομαι
5. Ακριβός / Καταθέτω χρήματα
6. Τζίρος
7. Δηνάριο
8. Γραμμάτιο (ακατάληκτο) / Μετρητοίς / Δραχμή
9. Συναλλαγή / Γιέν
10. Έκπτωση
11. Συμβόλαιο.

ΜΑΘΗΜΑ 35ο

ΧΡΗΣΗ — ΣΗΜΑΣΙΑ ΤΟΥ ΕΠΙΡΡΗΜΑΤΟΣ «for»

● Το επίρρημα **for**, όπως είναι κι όλας γνωστό, σημαίνει γενικά «μακρυά».

Με την έννοια αυτή δείχνει:

α) Κίνηση προς μακρυά.

— mi iris **for** (= πήγα μακρυά)
— mi sendis ĝin **for** (= το έστειλα μακρυά)
— mia penso kuris **for** de vi (= η σκέψη μου έτρεξε μακρυά σου)
— oni dissendos la revuojn **for** en la mondon (= θα στείλουν τα περιοδικά μακρυά στον κόσμο)

β) Θέση μακρυά.

— mi vivas **for** de mia partujo (= ζω μακρυά από την πατρίδα μου)
— li restis tute indiferenta, kvazaŭ li starus **for** de nia mondo (= έμενε εντελώς αδιάφορος, σαν να στεκόταν μακρυά από τον κόσμο μας)
— tio estis **for** de miaj intencoj (= αυτό ήταν μακρυά από τις προθέσεις μου)

Σημείωση

● Όπως έχει αναφερθεί σε προηγούμενο μάθημα, το **for** χρησιμοποιείται και σαν επιφώνημα αποπομπής και σημαίνει «μακρυά», ή «πέρα».

— **for** la manojn! (= μακρυά τα χέρια!)
— **for** de mi! (= μακρυά από μένα!)
— **for** de tie ĉi! (= μακρυά απ' εδώ!)

● Από το επίρρημα **for** σχηματίζονται:
α) Το επίθετο **fora** (= μακρυνός).

— la **fora** futuro (= το μακρυνό μέλλον)
— la **foraj** landlimoj (= τα μαρκυνά σύνορα)
— **fora** lando (= μακρυνή χώρα)

β) Το παράγωγο επίρρημα **fore** (= μακρυά), που εννοιολογικά σε τίποτα δεν διαφέρει από το **for**.

— li loĝas ne tre **fore** de mi (= μένει όχι πολύ μακρυά από μένα)
— li kuris **foren** (= έτρεξε [προς] μακρυά)

γ) Το ουσιαστικό **foro** (= σημείο, τόπος μακρυά).

— li malaperis en la **foro** (= χάθηκε πέρα — στο βάθος)
— en la **foro** de la horizonto (= πέρα — στο βάθος του ορίζοντα)

δ) Το ρήμα **fori** (= είμαι μακρυά).

— mi fervore laboras, tamen la atingo de miaj celoj ankoraŭ **foras** (= εργάζομαι με ζήλο, όμως η επίτευξη των σκοπών μου είναι ακόμα μακρυά)

Σημείωση

● Το επίρρημα **for** σε σύνθεσή του με τα επιθήματα **ig** και **iĝ** σχηματίζει τα ρήματα **forigi** (= απομακρύνω) και **foriĝi** (= απομακρύνομαι).

— mi **forigis** lin de mia hejmo (= τον απομάκρυνα από το σπίτι μου)
— mi tiel respondis kaj tuj **foriĝis** (= έτσι απάντησα κι αμέσως απομακρύνθηκα)

● Το επίρρημα **for** σαν πρώτο συνθετικό ρήματων προσδίνει στα σύνθετα ρήματα, που σχηματίζει, δύο σημασίες:
α) Της απομάκρυνσης.

— **foresti** = απουσιάζω
— **foriri** = φεύγω
— **forpeli** = διώχνω μακρυά
— **forkuri** = τρέχω μακρυά

— **forĵeti** = ρίχνω μακρυά
— **forpreni** = παίρνω μακρυά
— **forlasi** = εγκαταλείπω

β) Της εξαφάνισης, χαμού, εξολόθρευσης.

Στην περίπτωση αυτή το **for** δίνει στα ρήματα την έννοια, που σε παρόμοιες περιπτώσεις δείχνει η πρόθεση «κατά» της Ελληνικής (κατατρώγω, κατακαίω κ.λπ.).

— **formanĝi** = καταβροχθίζω (= τρώγω κάτι εντελώς, μέχρι να εξαφανιστεί)
— **forbuĉi** = κατασφάζω
— **foruzi** = καταναλώνω (= χαλάω από την πολλή χρήση)
— portante ilin ĉiutage, mi **foruzis** miajn ŝuojn en nur ses monatoj (= φορώντας τα κάθε μέρα, χάλασα τὰ παπούτσια μου σε μόνο έξι μήνες)
— **forludi** = καταναλώνω, εξαφανίζω παίζοντας
— li **forludis** sian tutan monon (= έπαιξε όλα τα λεφτά του [έπαιξε και έχασε, εξαφάνισε])

Στις περιπτώσεις λοιπόν αυτές, το **for** δίνει στα σύνθετα ρήματα την έννοια «εξαφανίζω, καταστρέφω κάτι, κάνοντας αυτό που δείχνει το ρήμα».

— **foruzi** = καταστρέφω, εξαφανίζω χρησιμοποιώντας
— **forbuĉi** = καταστρέφω, εξαφανίζω σφάζοντας
— **formanĝi** = καταστρέφω, εξαφανίζω τρώγοντας
— **forludi** = καταστρέφω, εξαφανίζω παίζοντας.

ΧΡΗΣΗ-ΣΗΜΑΣΙΑ ΤΗΣ ΠΡΟΘΕΣΗΣ «antaŭ»

● Η πρόθεση **antaŭ** έχει τη σημασία «πριν» ή «μπροστά». Έχει επομένως διπλή έννοια, χρονική και τοπική.

Χρονική (πριν)

— **antaŭ** du tagoj mi diris tion (= πριν δύο μέρες το είπα αυτό).

— **antaŭ** kelkaj jaroj neniu povis imagi tion (= πριν μερικά χρόνια κανείς δεν μπορούσε να το φανταστεί αυτό).
— mi revenis hejmen **antaŭ** la fino de miaj ferioj (= γύρισα στο σπίτι πριν από το τέλος των διακοπών μου).
— mi neniam vekiĝas **antaŭ** la deka (= ποτέ δεν ξυπνάω πριν τις δέκα).
— mi renkontis lin **antaŭ** nelonge (= τον συνάντησα πριν λίγο).

Σημείωση

● Συχνά η χρονική **antaŭ** χρησιμοποιείται σε σχέση με το **ol (antaŭ ol)**, κυρίως όταν ακολουθεί ρήμα.
Έτσι:

— mi finis mian laboron **antaŭ** via reveno (= τελείωσα τη δουλειά μου πριν από την επιστροφή σου).

αλλά:

— mi finis mian laboron **antaŭ ol** vi revenis (= τελείωσα τη δουλειά μου πριν να γυρίσεις).
— vi ne respondu, **antaŭ ol** pensi (= μην απαντάς πριν να σκεφθείς).
— ŝi petis de mi konsilon, **antaŭ ol** decidi (= μου ζήτησε συμβουλή πριν αποφασίσει).
— **antaŭ ol** vi parolis, mi sciis, kion vi respondos (= πριν μιλήσεις ήξερα τι θα απαντήσεις).

Τοπική (μπροστά)

— li staris **antaŭ** la pordo (= στάθηκε μπροστά στην πόρτα).
— **antaŭ** mia domo estas granda preĝejo (= μπροστά στο σπίτι μου είναι μεγάλη εκκλησία).
— mi parolis **antaŭ** publiko (= μίλησα μπροστά σε κοινό).
— ŝi faris ĉion **antaŭ** miaj okuloj (= τα έκανε όλα μπροστά στα μάτια μου).
— li marŝis **antaŭ** mi (= βάδιζε μπροστά μου).
— ŝi ĵetis sin **antaŭ** miajn piedojn (= ρίχτηκε μπροστά στα πόδια μου).

● Από την πρόθεση **antaŭ** σχηματίζονται:
α) Το επίθετο **antaŭa**, με δίπλή έννοια, χρονική (προηγούμενος; περασμένος) και τοπική (μπροστινός, επρόσθιος).

— mi renkontis lin la **antaŭan** semajnon (= τον συνάντησα την προηγούμενη [περασμένη] εβδομάδα).

— tradicio heredita de **antaŭaj** tempoj kaj generacioj (= παράδοση κληρονομημένη από προηγούμενους καιρούς και γενηές).
— la **antaŭa** parto de mia domo (= το μπροστινό μέρος του σπιτιού μου).
— la **antaŭaj** kruroj de la ĉevalo (= τα μπροστινά πόδια του αλόγου).

β) Το παράγωγο επίρρημα **antaŭe** με διπλή έννοια, χρονική (πριν, προηγούμενα) και τοπική (μπροστά, εμπρός).

— oni postulis, ke mi pagu **antaŭe** (= απαίτησαν να πληρώσω πριν [μπροστά]).
— mi estis preta de **antaŭe** (= ήμουν έτοιμος από πριν).
— li faris tion **antaŭe** de via alveno (= το έκανε αυτό πριν από τον ερχομό σου).
— li staris **antaŭe** (= στεκόταν μπροστά).
— vi iru **antaŭen** (= πήγαινε μπροστά).
— **antaŭe** iris li, kaj sekvis lia frato (= μπροστά πήγαινε αυτός, και ακολουθούσε ο αδελφός του).

● Η πρόθεση **antaŭ** σε συνθέσεις της με άλλες λέξεις προσδίνει στις σύνθετες λέξεις, που σχηματίζει, την έννοια του «πριν» ή του «μπροστά».

urbo = πόλη → **antaŭurbo** = προάστειο
ĉambro = δωμάτιο → **antaŭĉambro** = προθάλαμος
iri = πηγαίνω → **antaŭiri** = προηγούμαι
pagi = πληρώνω → **antaŭpagi** = προπληρώνω
vidi = βλέπω → **antaŭvidi** = προβλέπω
kalkuli = λογαριάζω → **antaŭkalkuli** = προϋπολογίζω

ΛΕΞΕΙΣ ΠΟΥ ΑΦΟΡΟΥΝ ΤΟ ΧΡΟΝΟ (TEMPOVORTOJ)

● Στο κεφάλαιο αυτό αναφέρονται συγκεντρωτικά οι κυριότερες λέξεις, που αφορούν το χρόνο. Οι περισσότερες από τις λέξεις αυτές είναι κι όλας γνωστές στο σπουδαστή αυτού του βιβλίου.

πριν = **antaŭe**
τώρα = **nun**
μετά = **poste**
χθες = **hieraŭ**
σήμερα = **hodiaŭ**
αύριο = **morgaŭ**
προχθές = **antaŭhieraŭ**
μεθαύριο = **postmorgaŭ**
πέρυσι = **pasintjare**
εφέτος = **ĉi-jare**
του χρόνου = **venontjare**
δευτερόλεπτο = **sekundo**
λεπτό = **minuto**
στιγμή = **momento**
ώρα = **horo**
δίωρο, τρίωρο, τετράωρο κ.λπ. = **horduo, hortrio, horkvaro** κ.λπ.
ημέρα = **tago**
πρωΐ = **mateno**
(το) πριν το μεσημέρι = **antaŭtagmezo**
μεσημέρι = **tagmezo**
απόγευμα, μεταμεσήμερο = **posttagmezo**
βράδυ = **vespero**
νύχτα = **nokto**
μεσάνυχτα = **noktomezo**
διήμερο, τριήμερο, τετραήμερο κ.λπ. = **tag(o)duo, tag(o)trio, tag(o)-kvaro** κ.λπ.
εβδομάδα = **semajno**
Σαββατοκύριακο = **semajn(o)fino**
μήνας = **monato**
διμηνία, τριμηνία, τετραμηνία κ.λπ. = **monat(o)duo, monat(o)trio, monat(o)kvaro** κ.λπ.
εξάμηνο = **monat(o)seso** ή **duonjaro**
έτος = **jaro**
διετία, τριετία, τετραετία κ.λπ. = **jarduo, jartrio, jarkvaro** κ.λπ.
αιώνας = **jarcento**
χηλιετηρίδα = **jarmilo**
δίκεστο έτος = **superjaro**
καθημερινός = **ĉiutaga**
εβδομαδιαίος = **ĉiusemajna**
μηνιαίος = **ĉiumonata**
ετήσιος = **ĉiujara**

ΑΣΤΕΡΙΣΜΟΙ ή ΖΩΔΙΑΚΑ ΣΗΜΕΙΑ
(KONSTELACIOJ aŭ ZODIAKAJ SIGNOJ)

- Τα ονόματα των αστερισμών (ζώδια) στην Εσπεράντο είναι:

Amforo	21/1-18/2	(Υδροχόος)
Fiŝoj	19/2-20/3	(Ιχθύες)
Ŝafo	21/3-19/4	(Κριός)
Taŭro	20/4-20/5	(Ταύρος)
Ĝemeloj	21/5-21/6	(Δίδυμοι)
Kankro	22/6-22/7	(Καρκίνος)
Leono	23/7-22/8	(Λέων)
Virgo	23/8-22/9	(Παρθένος)
Pesilo	23/9-23/10	(Ζυγός)
Skorpio	24/10-22/11	(Σκορπιός)
Sagitario	23/11-21/12	(Τοξότης)
Kaprikorno	22/12-20/1	(Αιγόκερως)

ΓΝΩΣΤΕΣ-ΑΓΝΩΣΤΕΣ ΛΕΞΕΙΣ
(συνέχεια από το προηγούμενο μάθημα)

haremo = χαρέμι
harpo = άρπα
haŝiŝo = χασίς
hebreo = Εβραίος
hekatombo = εκατόμβη
helikoptero = ελικόπτερο
hemiplegio = ημιπληγία
hemisfero = ημισφαίριο
hemoragio = αιμορραγία
hepato = σικώτι, ήπαρ
hidroplano = υδροπλάνο
hidroterapio = υδροθεραπεία
hierarkio = ιεραρχία
hieratika = ιερατικός
hieroglifo = ιερογλυφικό
higieno = Υγιεινή (Επιστ.)
himno = ύμνος
hipertrofio = υπερτροφία
hipnoto = ύπνωση
hipodromo = ιπποδρόμιο
hipofizo = υπόφυση
hipohondrio = υποχονδρία
hipokriti = υποκρίνομαι
hipopotamo = ιπποπόταμος
hipoteko = υποθήκη
hipotezo = υπόθεση
histerio = υστερία
historiografo = Ιστοριογράφος
(**-io** = Ιστοριογραφία)
homonimo = ομώνυμο

horizonto = ορίζοντας
horloĝo = ρολόι
humuro = χιούμορ
ĥameleono = χαμαιλέων
ĥaoso = χάος
ĥemio = Χημεία
ĥimero = χίμαιρα
ĥolero = χολέρα
idiosinkrazio = ιδιοσυγκρασία
idolo = είδωλο
iktero = ίκτερος
instituto = Ινστιτούτο
ironio = ειρωνία
istmo = ισθμός
jasmeno = γιασεμί
jodo = ιώδιο
jonosfero = ιονόσφαιρα
ĵeleo = ζελές
kadro = κάδρο, πλαίσιο
kafeino = καφεΐνη
kafeterio = καφετέρια
kakeksio = καχεξία
kakao = κακάο
kakofonio = κακοφωνία
kakto = κάκτος
kalo = κάλος
kalifo = χαλίφης
kaligrafo = καλλιγράφος
kamelo = καμήλα
kamelio = καμέλια
kamerao = κάμερα (φωτ.)
kamforo = κάμφορα
kamiono = καμιόνι
kamomilo = χαμομήλι
kamufli = καμουφλάρω
kanajlo = κανάγιας, κατεργάρης
kanalo = κανάλι, διώρυγα
kanario = καναρίνι
kanguruo = καγκουρώ
kanibalo = καννίβαλος
kanono = κανόνι
kantino = καντίνα
kaprico = καπρίτσιο, ιδιοτροπία
karabeno = καραμπίνα
karafo = καράφα
karamelo = καραμέλα
karavano = καραβάνι
kardinalo = καρδινάλιος
kareno = καρίνα
kariero = καριέρα, σταδιοδρομία
karikaturo = καρικατούρα
karnavalo = καρναβάλι, αποκρηά
karoserio = καροσερί, αμάξωμα
karotido = καρωτίδα
karto = κάρτα, καρτέλα
kartografo = χαρτογράφος
kasko = κάσκα, κράνος
kasto = κάστα
kastoro = κάστορας
kaŝtano = κάστανο
kataifo = κανταΐφι
katakombo = κατακόμβη
katalepsio = καταληψία
katalogo = κατάλογος
katapulto = καταπέλτης
kataro = καταρροή
katastrofo = καταστροφή
kateĥizi = κατηχώ
katoliko = Καθολικός (θρησ.)
kaŭĉuko = καουτσούκ
kaŭstika = καυστικός
kaviaro = χαβιάρι
kazino = Καζίνο
kilo = χιλιόγραμμο, κιλό
kimono = κιμονό
kirurgo = χειρούργος
klepsidro = κλεψύδρα
kleptomanio = κλεπτομανία
klimaktero = κλιμακτήριος
klimato = κλίμα
klitoro = κλειτορίδα
kloro = χλώριο
klorofilo = χρωροφύλλη

LEKSIKO

almozo = ελεημοσύνη
aroganta = αλαζονικός, θρασύς
buĝeto = προϋπολογισμός
cirkonstanco = περίσταση
devanci = ξεπερνώ
ekvilibro = ισορροπία
elemento = στοιχείο
embaraso = αμηχανία
fanfaroni = καυχιέμαι, περιαυτολογώ
favora = ευνοϊκός
graveda = έγκυος
honorario = αμοιβή
honti = ντρέπομαι
kajero = τετράδιο
kapitalo = κεφάλαιο
koincidi = συμπίπτω
konfirmi = επιβεβαιώνω, επικυρώνω
kraki = τρίζω (αμετ.)
krimo = έγκλημα, αδίκημα
kritiki = κρίνω, κριτικάρω
mola = μαλακός
optimismo = αισιοδοξία
optimisto = αισιόδοξος
osto = οστό, κόκκαλο
pedanto = σχολαστικός άνθρωπος
pesimismo = απαισιοδοξία
pesimisto = απαισιόδοξος
poŝo = τσέπη
privata = ιδιωτικός
reala = πραγματικός
rekompenci = ανταμείβω
revi = ονειροπολώ, ονειρεύομαι
salajro = μισθός
skribi = γράφω
sonĝo = όνειρο
ŝpari = αποταμιεύω
varo = εμπόρευμα

TEKSTO

La familio Georgopulos ne estas riĉa. Estas vere, ke ĝia nuna financa situacio estas sufiĉe bona, sed ne riĉa. La familio do vivas sufiĉe oportune, sed ne lukse.

La tuta familia buĝeto baziĝas precipe sur la salajro[1] de sinjoro Vasilis kaj due sur la pensio de sinjorino Evangelia. Estas vere, ke la salajro de banka direktoro estas sufiĉe alta, sed sinjono Vasilis ne estis ĉiam direktoro.

---

1. Η λέξη «**salajro**» σημαίνει «ποσόν που σε τακτικές περιόδους πληρώνεται σε εργαζόμενο», ανταποκρίνεται λοιπόν στη λέξη «μισθός». Αντίθετα, το ποσόν που πληρώνεται σε κάποιον, που παρέχει παροδική υπηρεσία, σαν ελεύθερος ή έκτακτος επαγγελματίας (δικηγόρος, γιατρός, τεχνίτης κ.λπ.) αποδίδεται με τη λέξη «**honorario**» (= αμοιβή).

Πρέπει κανείς να προσέξει ώστε να μη συγχέει τις πιο πάνω λέξεις, με τη λέξη «**rekompenco**». Η λέξη αυτή προέρχεται από το ρήμα «**rekompenci**», που σημαίνει «α-

La unuaj paŝoj de la familio estis sufiĉe malfacilaj. Tre ofte la geedzoj memoras la malfacilaĵojn, kiujn ili alfrontis la unuajn jarojn post sia edziĝo. Tiam ili estis devigataj vivi tre modeste, senigante sin je multaj, eĉ la plej elementaj plezuroj.

Granda revo[2] de la juna paro estis tiam la privata hejmo, afero, kiu postulis multjaran ŝparadon[3].

Sinjoro Vasilis ne perdas la okazon rakonti tre fiere al siaj infanoj, kiel bone li kaj ilia patrino sukcesis alfronti eĉ la plej malfavorajn cirkonstancojn, per siaj propraj fortoj, neniam depruntinte eĉ drakmon de alia persono.

Li pruvas per sia propra ekzemplo, ke estas ne la mono, kiu aplortas la feliĉon al la homoj, sed ilia laboremo kaj plena fido al si mem.

Estas vere, ke la geedzoj kun nostalgio memoras tiujn malfacilajn, sed bonajn unuajn jarojn de sia geedza vivo, plena je problemoj, sed ankaŭ je feliĉo.

Ili ambaŭ estas optimistoj[4], personoj gajaj kaj laboremaj, kiuj povis esti

---

νταμείβω», δηλαδή «δίνω ή κάνω κάτι καλό, σε ανταπόδοση καλού, που μου έγινε».

Η λέξη «rekompenco» επομένως σημαίνει «ανταμοιβή», που δεν είναι ασφαλώς μόνο χρήμα, και δεν έχει σχέση με την αμοιβή, τακτική ή έκτακτη, εργαζομένου (salajro, honorario).

2. Ο Έλληνας σπουδαστής της Εσπεράντο πρέπει να προσέξει τη λέξη «**revi**». Η λέξη αυτή σημαίνει «ονειροπολώ», «κάνω όνειρα», δηλαδή «φαντάζομαι κάτι που πολύ επιθυμώ». Έτσι «**revo**» σημαίνει «όνειρο», «ονειροπόληση», με την έννοια «ευγενής πόθος», «σφοδρή επιθυμία» (έχω πολλά όνειρα για το παιδί μου, ονειρεύομαι ένα όμορφο σπίτι, ανεκπλήρωτο όνειρο, κ.λπ.). Η λέξη αυτή επομένως δεν έχει καμία σχέση με τη λέξη «όνειρο» (= ενύπνιο), δηλαδή τις εικόνες που βλέπει κανείς στον ύπνο του. Η έννοια αυτή αποδίδεται στην Εσπεράντο με τη λέξη «**sonĝo**».

Η παρατήρηση γίνεται, γιατί στα Ελληνικά και οι δύο έννοιες αποδίδονται με την ίδια λέξη «όνειρο».

3. Το ρήμα «**ŝpari**» σημαίνει «αποταμιεύω», και αφορά κυρίως το χρήμα. Ανταποκρίνεται στην ελληνική έννοια «μαζεύω χρήματα» ή «κάνω οικονομίες».

Έτσι: «**ŝparema**» (= οικονόμος), «**ŝparado**» (= αποταμίευση), «**ŝparaĵo**» (= οικονομίες, μαζεμένα χρήματα).

4. Μια ιδιαιτερότητα παρατηρείται στην Εσπεράντο με τις λέξεις «αισιοδοξία» και «αισιόδοξος», «απαισιοδοξία» και «απαισιόδοξος».

Επηρεασμένη από τις λατινογενείς Γλώσσες η Εσπεράντο περιλαμβάνει στο λεξιλόγιό της δύο διαφορετικές ρίζες, την «**optimism-o**» (= αισιοδοξία), και την «**optimist-o**» (= αισιόδοξος).

Οι λέξεις επομένως αυτές δεν είναι παράγωγες κάποιας άλλης ρίζας, δηλαδή δε σχηματίστηκαν με τη βοήθεια των επιθημάτων **ism** και **ist**, αλλά είναι ανεξάρτητες και αυτοτελείς ρίζες.

Το ίδιο συμβαίνει και με τις αντίθετές τους έννοιες (απαισιοδοξία, απαισιόδοξος), που δεν σχηματίζονται με το πρόθημα **mal**, αλλά περιλαμβάνονται κι αυτές στο λεξιλόγιο της Εσπεράντο ως ανεξάρτητες αυτοτελείς ρίζες. Έτσι: «**pesimismo**» (= απαισιοδοξία) και «**pesimisto**» (= απαισιόδοξος).

ĉiam kontentaj, eĉ kiam ili posedis nur malmulton.

De la komenco ili metis antaŭ si sufiĉe malfacilan planon, kiun ili fidele sekvis dum multaj jaroj, ĝis kiam ĝi estis tute plenumita.

Unua celo estis la aĉeto de loĝejo, kiu tegmentus ilian grandan familion pri kiu ekde tiam ili revis[2].

Por realigi tiun ĉi revon, ili devis ĉion atente kalkuli kaj mezuri.

Ili ankoraŭ memoras tiun kajeron, en kiu ili plenzorge skribis ĉiumonate la antaŭvidatajn elspezojn de la familio, klopodante kiel eble plej multe limigi ilin, tiel ke restu sufiĉe granda sumo por la banka konto, destinita al la aĉeto de la familia nesto.

En la komenco, la afero ŝajnis al la junaj geedzoj tre simpla, sed iom post iom la familiaj bezonoj plialtiĝis, la infanoj venis tre frue, kaj la gepatroj, en granda embaraso, konstatis, ke la neantaŭviditaj elspezoj superas la konstantajn.

Tiam sinjoro Vasilis decidis pluslabori en la banko, kaj sinjorino Evangelia prenis laboron en la hejmo, kiel librotenistino de malgrandaj komercaj entreprenoj. Tamen, ankaŭ tio ne donis la solvon. Estas vere, ke la familia kapitalo, drakmo post drakmo plialtiĝis, sed la familiaj elspezoj ofte devancis la enspezojn.

Tiam sinjoro Vasilis ricevis la grandan decidon vendi la heredan patran agron, kiu cetere neniun renton donis al li.

La afero estis ne tre simpla, ĉar tiu decido kaŭzis, kompreneble, la indignon de sinjoro Janis, kiu tute ne aprobis tiun ĉi «stultaĵon» de la «junulo». Li do klopodis konvinki sian junan fraton ŝanĝi decidon, li eĉ oferis al li sian tutan ŝparaĵon[3], por atingi tion. Sinjoro Vasilis, kompreneble, ne akceptis tion. La agro ja apartenis al li, tamen, pro respekto al la granda frato, sinjoro Vasilis nenion volis fari antaŭ ol konvinki lin, ke tiu solvo estas la plej ĝusta.

Finfine, post interveno de la dua frato, la kuracisto, kaj de aliaj parencoj, sinjoro Janis konvinkiĝis doni sian aprobon. Li devige konfirmis la «krimon» de sia juna frato, tamen li metis kondiĉon, ke li nepre konservu malgrandan parton de sia bieno, por ion posedi en la vilaĝo, kaj por ne «kraku la ostoj de ilia patro».

Sinjoro Vasilis obeis, kaj neniam pentis pri tio, kontraŭe li estas danka al sia frato pro lia saĝa konsilo.

Post la vendo de la agro, la bezonata sumo kompletiĝis, kaj la malnova revo povis realiĝi.

Tiam sinjorino Evangelia estis graveda je sia tria infano, kaj la granda momento, tiu de la aĉeto de la hejmo, koincidis kun alia feliĉa evento, la naskiĝo de Maria. Ekde tiam pasis jam multaj jaroj. La familia financa situacio iom post iom ŝanĝiĝis, sed la familiaj bezonoj intertempe plimultiĝis, tiel ke la familio ĉiam devas atente konservi ekvilibron inter la en-

spezoj kaj la elspezoj de la familia buĝeto.

Laŭ la ekzemplo de siaj gepatroj, la junuloj de la familio estas sufiĉe moderaj en siaj elspezoj.

Ili lernis bone du objektojn. Unue, ke plena poŝo nenion signifas, ĉar la homa feliĉo ne estas varo aĉetebla, kaj due, ke la mono ne devas esti vivocelo, sed nur vivrimedo, kiu tamen devas esti prudente uzata.

Ili alkutimiĝis esti ŝparemaj[3], ĉar ili lernis, ke nur post longa ŝparado oni povas efektivigi multekostan planon, kiel por ekzemplo estas vojaĝo, aŭ granda ekskurso.

La knaboj, jam «viroj» fieraj kaj sendependaj, ne akceptas ja limiĝi al la mondonacoj de la gepatroj. Ili ĉiam trovas la okazon ion gajni per sia propra laboro, kiam ilia studprogramo permesas tion.

Kostas instruas al infanoj gitarludadon, aŭ partoprenas orkestrajn grupojn, kiuj, kontraŭ perioda honorario[1], ludas en diversaj klubejoj, precipe dum karnavalo. Nikos de tempo al tempo laboras ĉe fabriko, kiu produktas malgrandajn elektroaparatojn, kaj apartenas al malproksima parenco de la familio.

Tiajn laborojn de la junuloj ne aprobas la avino, kiu preferus, ke ili okupu sin nur pri sia studado kaj ne laciĝu tre multe.

Kontraŭe sinjoro Vasilis kaŝe fieras, ĉar liaj filoj estas, same kiel li, laboremaj.

La plej ŝparema el ĉiuj estas Maria. Ŝi neniam elspezas sian monon senpripense. Kontraŭe ŝi tre pedante kalkulas ĉion, antaŭ ol pagi eĉ unu drakmon.

Ŝiaj fratoj nomas ŝin «avara» kaj ŝi nomas ilin «almozuloj», ĉar sufiĉe ofte ili petas de ŝi prunton.

EKSPLIKOJ

— **senigante sin** = farante sin esti sen...
— **pluslabori** = labori dum pli multaj horoj ol ordinare
— **librotenistino** = kontistino
— **cetere** = krome, krom tio
— **stultaĵo** = faro aŭ diro stulta
— **intertempe** = dume
— **senpripense** = ne multe kaj ne serioze pensinte

EKZERCOJ

a) Vi respondu al la sekvantaj demandoj, nepre uzante plenajn frazojn:

1) Sur kio baziĝas la buĝeto de la familio Georgopulos?
2) Kiamaniere la geedzoj vivis en la unuaj jaroj post sia edziĝo?
3) Kio, laŭ sinjoro Vasilis, alportas feliĉon al la homoj? Ĉu la mono?
4) Ĉu la ĉefa revo de la geedzoj estis facile atingebla? Se ne, kial?
5) Kio kaŭzis embarason al la geedzoj?
6) Kiun kondiĉon metis sinjoro Janis al sia frato kaj kial?
7) Kion la junuloj lernis rilate al la mono?
8) Per kia laboro Kostas gajnas monon?
9) Kial sinjoro Vasilis fieras pri siaj filoj?
10) Kial la knaboj nomas sian fratinon «avara»?

b) Vi kompletigu la vortojn laŭ la donata signifo:

1) konst_____ (σταθερός, διαπιστώνω, αστερισμός, κτίζω).
2) kont_____ (μετρητοίς, ήπειρος, επαφή, ικανοποιημένος, ελέγχω, συμβόλαιο, κατά).
3) kor_____ (διάδρομος, σώμα, αυλή, καλάθι, διορθώνω).
4) kra_____ (βρύση, τρίζω, γραβάτα, σχάρα).
5) kre_____ (πιστεύω, φύομαι, πίστωση).
6) kri_____ (έγκλημα, Χριστός, κρίση, ανάπηρος, τσιπούρα).
7) kuku_____ (αγγούρι, κολοκύθι).
8) kur_____ (θαρραλέος, κουρτίνα, θεραπεύω).
9) kva_____ (ποιότητα, ποσότητα, σαν, τετράγωνο, αν και, συνοικία).
10) lak_____ (γάλα, ευκοιλιότητα, μαρούλι).
11) leg_____ (λαχανικό, όσπριο).
12) luk_____ (πολυτέλεια, παλεύω).
13) man_____ (τρόπος, λείπω, τρώγω, μανδύας).
14) mar_____ (σημάδι, μαρμελάδα, Τρίτη, βαδίζω, Μάρτιος).
15) mat_____ (ματς, υλικό, ώριμος, πρωί).
16) med_____ (μετάλλιο, φάρμακο, Ιατρική, περιβάλλον).
17) mel_____ (γαλοπούλα, μελιτζάνα).
18) men_____ (παραγγέλνω, σαγόνι, μενού, ψεύδομαι).
19) min_____ (απειλώ, λεπτό, μείον, ορυκτό).
20) mode_____ (ολιγαρκής, μοντέρνος, μετριόφρων).
21) mon_____ (καλόγερος, κόσμος, βουνό, μήνας, μνημείο, δείχνω).
22) mor_____ (ηθική, μορταδέλα, αύριο, πεθαίνω).
23) mus_____ (μουστάρδα, μυώνας).

24) muz_____ (Μουσείο, μουσική).

c) Vi traduku en Esperanton la jenan tekston:

«Αγαπάμε το ωραίο στην απλότητά του και φιλοσοφούμε χωρίς να γινόμαστε μαλθακοί. Χρησιμοποιούμε τον πλούτο μας για να κάνουμε μεγάλα έργα και όχι για να καυχιόμαστε. Κανείς μας δεν ντρέπεται να ομολογήσει πως είναι φτωχός, μα είναι για μας μεγάλη ντροπή, όταν κάποιος δεν προσπαθεί να βγει από την φτώχεια του με την εργασία του. Εκείνοι από μας, που ασχολούνται με την πολιτική, μπορούν ταυτόχρονα να φροντίζουν και για τις ιδιωτικές τους υποθέσεις, και όσοι είναι εντελώς απασχολημένοι με την εργασία τους, μπορούν πάντα να γνωρίζουν και να κρίνουν τα πολιτικά ζητήματα. Και μόνο εμείς, αυτόν που δεν ενδιαφέρεται καθόλου για την πολιτική, τον θεωρούμε όχι άνθρωπο φιλήσυχο, αλλά άχρηστο.

Εμείς οι ίδιοι συζητούμε για τα ζητήματά μας, και παίρνουμε σωστές αποφάσεις, γιατί δεν νομίζουμε ότι οι συζητήσεις βλάπτουν τα έργα, αλλά πιστεύουμε αντίθετα, ότι είναι βλαβερό να μην κατατοπισθούμε καλά με τις συζητήσεις, πριν αρχίσουμε να κάνουμε αυτό που πρέπει.

Διαφέρουμε από τους άλλους ανθρώπους επίσης κατά τούτο, ότι εμείς οι ίδιοι σκεπτόμαστε πρώτα καλά κάθε τι επικίνδυνο, που θα επιχειρήσουμε, και δειχνόμαστε τολμηροί, όταν το επιχειρούμε, ενώ τους άλλους ανθρώπους η άγνοια τους κάνει θρασείς και η γνώση διστακτικούς.

(Θουκυδίδης «Επιτάφιος»)

ĉ) Krucvorto



Horizontale

1. Εβδομάδα / Μεθαύριο
2. Αύριο
3. Σήμερα
4. Βράδυ
5. Εξάμηνο
6. Απόγευμα
7. Λεπτό
8. Έτος
9. Νυχτώνει
10. Αυριανός

Vertikale

1. Του χρόνου
2. Νωρίς
3. Αιώνας
4. Μήνας
5. Στιγμή
6. Μεσάνυχτα (αιτ.)
7. Δεκάμηνο
8. Χθες / Ώρες
9. Πέρισυ

ΜΑΘΗΜΑ 36ο

ΧΡΗΣΗ — ΣΗΜΑΣΙΑ ΤΗΣ ΠΡΟΘΕΣΗΣ «post»

● Η πρόθεση **post** έχει τη σημασία «μετά» (μετά από, υστερα από) ή «πίσω» (πίσω από). Έχει επομένως διπλή έννοια, χρονική και τοπική.

α) Χρονική (μετά)

— **Post** du tagoj mi revenos (= μετά <από> δύο μέρες θα γυρίσω)
— Ebre **post** kelkaj jaroj, oni komprenos, ke mi nun tute pravas (= ίσως μετά <από> μερικά χρόνια θα καταλάβουν ότι τώρα έχω εντελώς δίκηο)
— **Post** kiom da tempo vi respondos al mi? (= μετά <από> πόσο καιρό θα μου απαντήσεις;)
— Mi respondos al vi **post** mia reveno (= θα σου απαντήσω μετά <από> την επιστροφή μου)
— **Post** tia pluvo nepre aperos brila la suno (= μετά <από> τέτοια βροχή οπωσδήποτε θα φανεί λαμπερός ο ήλιος)
— Ŝi estas la plej bela **post** sia fratino (= αυτή είναι η πιο όμορφη, μετά την αδελφή της)

Σημείωση

● Στα Ελληνικά, μερικές φορές επαναλαμβάνουμε μια λέξη, θέλοντας να δείξουμε την επανάληψη, τη χρονική ακολουθία του ίδιου πράγματος («το ήπια γουλιά γουλιά», «να το φας λίγο λίγο», «τα μάζεψα δραχμή δραχμή» κ.λπ.)

Στις περιπτώσεις αυτές βέβαια, ανάμεσα στις δύο όμοιες λέξεις υπονοείται η λέξη «μετά».

Στην Εσπεράντο, στις περιπτώσεις αυτές πρέπει να χρησιμοποιεί κανείς οπωσδήποτε τη λέξη **post**.

Έτσι:

iom post iom = λίγο λίγο
guto post guto = γουλιά γουλιά
paŝo post paŝo = βήμα βήμα
peco post peco = κομάτι κομάτι

● Συχνά η χρονική **post** χρησιμοποιείται σε σχέση με τη χρονική απλή λέξη **kiam (post kiam)**, όταν ακολουθεί ρήμα.
Έτσι:

— Mi venos ĉe vin **post** la foriro de via patro (= θα έρθω στο σπίτι σου μετά την αναχώρηση του πατέρα σου).

αλλά:

— Mi venos ĉe vin **post kiam** via patro foriros (= θα έρθω στο σπίτι σου μετά που θα <αφού> φύγει ο πατέρας σου).
— **Post kiam** mi aĉetis tion, mi ŝanĝis opinion (= μετά που <αφού> το αγόρασα, άλλαξα γνώμη)
— Ĉio okazis, **post kiam** li eniris en la ĉambron (= όλα έγιναν μετά πού <αφού> αυτός μπήκε στο δωμάτιο)

β) Τοπική (πίσω)

— Li kaŝis sin **post** la arbo (= κρύφτηκε πίσω από το δέντρο)
— Li staris **post** sia patro (= στεκόταν πίσω από τον πατέρα του)
— Li faris ĉion **post** mia dorso (= τα έκανε όλα πίσω από την πλάτη μου)
— Li foriris sen rigardi **post** si (= έφυγε χωρίς να κοιτάζει πίσω του)
— **Post** mia domo estas preĝejo (= πίσω από το σπίτι μου είναι εκκλησία)
— Ŝi malaperis **post** la pordo (= χάθηκε πίσω από την πόρτα)

Σημείωση

● Για την αποφυγή σύγχυσης, που είναι ενδεχόμενο να δημιουργήσει η διπλή έννοια (χρονική και τοπική) της πρόθεσης **post**, είναι δυνατόν να την χρησιμοποιεί κανείς μόνο με τη χρονική της έννοια, και τούτο γιατί η τοπική έννοια «πίσω» μπορεί κάλλιστα να αποδοθεί με τη λέξη **malantaŭ** (= πίσω).
Έτσι:

— Li kaŝis sin **malantaŭ** la arbo (= κρύφτηκε πίσω από το δέντρο)
— Ŝi malaperis **malantaŭ** la pordo (= χάθηκε πίσω από την πόρτα)

● Από την πρόθεση **post** σχηματίζονται:
α) Το επίθετο **posta** με διπλή έννοια, χρονική (κατοπινός) και τοπική (οπίσθιος, malantaŭa)

— La homaro memoros tion en **postaj** tempoj (= η ανθρωπότητα θα το θυμάται αυτό σε κατοπινούς καιρούς)
— La **postaj** generacioj devas ne honti, sed fieri pri ni (= οι κατοπινές γενηές πρέπει όχι να ντρέπονται, αλλά να περηφανεύονται για μας)
— La **posta** (malantaŭa) flanko de mia domo (= η πισινή πλευρά του σπιτού μου)

β) Το παράγωγο επίρρημα **poste** με διπλή έννοια, χρονική (έπειτα, ύστερα, μετά) και τοπική (όπισθεν, πίσω, malantaŭe)

Συχνά η έκφραση αυτή, κατά τη συνήθεια πολλών εθνικών Γλωσσών χρησιμοποιείται συντομευμένη (**ĝis!**), κυρίως απ' αυτόν που απαντά στον αποχαιρετισμό.

ΧΡΗΣΗ — ΣΗΜΑΣΙΑ ΤΗΣ ΠΡΟΘΕΣΗΣ «laŭ»

● Η πρόθεση **laŭ** δείχνει:

α) Την προσαρμογή, εξάρτηση, συμφωνία, έννοιες που αποδίδουν οι ελληνικές εκφράσεις «σύμφωνα με», «κατά το, τη, το», «ως προς».

Έτσι:

— mi agis **laŭ** via deziro (= ενήργησα σύμφωνα με [κατά] την επιθυμία σου).
— **laŭ** mia opinio tio ne estas ĝusta (= κατά τη γνώμη μου αυτό δεν είναι σωστό).
— tiu homo ĉiam agas **laŭ** sia kapo (= αυτός ο άνθρωπος πάντα ενεργεί κατά το κεφάλι του [κάνει του κεφαλιού του]).
— vi faru **laŭ** via eblo (= κάνε κατά τη δυνατότητά σου).
— li faris ĉion **laŭ** la plej bona maniero (= τα έκανε όλα κατά τον καλύτερο τρόπο).
— **laŭ** la reguloj de la gramatiko oni ne povas diri tion (= σύμφωνα με τους κανόνες της Γραμματικής δε μπορεί κανείς να το πει αυτό).
— **laŭ** la leĝo tio ne estas permisita (= σύμφωνα με το νόμο αυτό δεν επιτρέπεται).
— la infanoj restis silentaj **laŭ** la ordono de la instruisto (= τα παιδιά έμειναν σιωπηλά σύμφωνα με την εντολή του δάσκαλου).
— estis komuna funebro **laŭ** la kutimoj de la vilaĝo (= ήταν κοινό πένθος σύμφωνα με τις συνήθειες του χωριού).

— vi respondu **laŭ** miaj demandoj (= να απαντάς σύμφωνα με τις ερωτήσεις μου).
— li ŝanĝas opiniojn **laŭ** la cirkonstancoj (= αλλάζει γνώμες κατά τις περιστάσεις).
— ĉiu birdo kantas **laŭ** sia beko (= κάθε πουλί τραγουδάει σύμφωνα με το ράμφος του).
— vi elspezu **laŭ** via monujo (= να ξοδεύεις κατά [σύμφωνα με] το πορτοφόλι σου).
— vi skribu la nomojn **laŭ** alfabeta ordo (= γράψε τα ονόματα κατά αλφαβητική τάξη [σειρά]).
— ŝi estis simila al sia patro **laŭ** la karaktero (= ήταν όμοια με τον πατέρα της ως προς το χαρακτήρα).
— **laŭ** sia eksteraĵo ŝi estas tre bela (= ως προς [κατά] το παρουσιαστικό της είναι πολύ όμορφη).
— **laŭ** la dua demando oni povas supozi, ke... (= σύμφωνα με [ως προς] τη δεύτερη ερώτηση μπορεί κανείς να υποθέσει ότι...).
— manĝo **laŭ** la karto (= φαγητό αλα καρτ [σύμφωνα με τον κατάλογο]).
— mi konas lin nur **laŭ** la nomo (= τον γνωρίζω μόνο κατ' όνομα).
— mi lin estimas **laŭ** tio, kiel li kondutas kontraŭ siaj gepatroj (= τον εκτιμώ ως προς το πώς συμπεριφέρεται έναντι των γονιών του).
— mi subtenos vin **laŭ** tio, kiel serioze vi laboros (= θα σε υποστηρίξω σύμφωνα με το πόσο [πώς] σοβαρά θα δουλέψεις).
— mi pagos al vi **laŭ** tio, kiom multe vi laboros (= θα σε πληρώσω σύμφωνα με το πόσο πολύ θα δουλέψεις).
— mi rekompencos vin **laŭ** tio, ĉu vi sukcesos aŭ ne (= θα σε ανταμείψω σύμφωνα με το αν θα πετύχεις ή όχι).

β) Την κατεύθυνση παράλληλα σε κάτι που έχει μάκρος, έννοια που αποδίδει η ελληνική έκφραση «κατά μήκος».
Έτσι:

— li promenis **laŭ** la rivero (= περπατούσε κατά μήκος του ποταμού).
— li kuris **laŭ** la trotuaro (= έτρεξε κατά το μήκος του πεζοδρομίου).
— vi iru **laŭ** tiu ĉi vojo (= πήγαινε κατά το μήκος αυτού του δρόμου).
— la birdoj forflugis **laŭ** la montopinto (= τα πουλιά πέταξαν μακριά κατά μήκος της βουνοκορφής).
— ruĝa lumo etendiĝis **laŭ** la linio de la horizonto (= κόκκινο φως απλώθηκε κατά μήκος της γραμμής του ορίζοντα).

ΦΥΣΙΚΑ-ΑΤΜΟΣΦΑΙΡΙΚΑ ΦΑΙΝΟΜΕΝΑ
(FIZIKAJ-ATMOSFERAJ FENOMENOJ)

● Στο κεφάλαιο αυτό εξετάζονται συγκεντρωτικά οι πιο συνηθισμένες λέξεις, που αφορούν τα φυσικά-ατμοσφαιρικά φαινόμενα:

ατμόσφαιρα = **atmosfero**
καιρός = **vetero**
θερμοκρασία = **temperaturo**
βαθμός = **grado**

— La atmosfero estis tiel klara, ke oni povis distingi fore la unuajn domojn de la vilaĝo (= η ατμόσφαιρα ήταν τόσο καθαρή, που μπορούσε να διακρίνει κανείς μακριά τα πρώτα σπίτια του χωριού).
— La vetero hodiaŭ tute ŝanĝiĝis, hieraŭ ĝi estis sufiĉe trankvila kaj varma, sed hodiaŭ ĝi fariĝis malvarma kaj pluva (= ο καιρός σήμερα άλλαξε εντελώς, χθες ήταν αρκετά ήσυχος και ζεστός, αλλά σήμερα έγινε κρύος και βροχερός).
— Hodiaŭ mi tute ne eliros el mia hejmo, pro la malbona vetero (= σήμερα δε θα βγω καθόλου από το σπίτι μου, λόγω του κακού καιρού).
— Estis tiel malvarma vetero, ke la temperaturo atingis tri gradojn sub nulo (= ήταν τόσο κρύος καιρός, που η θερμοκρασία έφτασε [στους] τρεις βαθμούς κάτω από το μηδέν).
— La temperaturo baldaŭ malaltiĝos (= η θερμοκρασία σε λίγο θα πέσει).
— Li vivis en landoj kun tre altaj temperaturoj (= έζησε σε χώρες με πολύ ψηλές θερμοκρασίες).

φυσώ = **blovi**
άνεμος = **vento**
θύελλα = **ŝtormo**
κύμα = **ondo**

— Blovis forta sed varma suda vento (= φυσούσε δυνατός αλλά ζεστός νότιος άνεμος).
— La malgranda ŝipo, puŝata de favora vento, flugis sur la ondoj (= το μικρό πλοίο, ωθούμενο από ευνοϊκό άνεμο, πετούσε πάνω στα κύματα).
— Blovis tiel forta vento, ke oni ne povis eĉ stari sur la ferdeko (= φυσούσε τόσο δυνατός άνεμος, που δεν μπορούσε κανείς

ούτε καν να σταθεί πάνω στο κατάστρωμα).

— La altaj ondoj brue rompiĝis sur la roka marbordo (= τα ψηλά κύματα με θόρυβο έσπαζαν πάνω στη βραχώδη ακτή).
— Li malespere remis per siaj tutaj fortoj kontraŭ la sovaĝaj ondoj (= απελπισμένα κωπηλατούσε με όλες τις δυνάμεις του ενάντια στα άγρια κύματα).
— Blovis vento de 8-9 Bofortaj gradoj; estis vera ŝtormo (= φυσούσε άνεμος 8-9 [βαθμών] Μπωφόρ· ήταν αληθινή θύελλα).
— La ŝtormo baldaŭ atingos la marbordon de la insulo (= η θύελλα σε λίγο θα φθάσει στην ακτή του νησιού).

σύννεφο = **nubo**
ομίχλη = **nebulo***
βροχή = **pluvo***
αστραπή, κεραυνός = **fulmo***
χαλάζι = **hajlo***
βροντώ = **tondri**
χιόνι = **neĝo***
παγετός = **frosto***
παγετώντας = **glaĉero***

— Dum la tuta tago falis forta pluvo (= όλη την ημέρα έπεφτε δυνατή βροχή).
— Printempa pluvo daŭras mallonge (= η ανοιξιάτικη βροχή διαρκεί λίγο).
— Dum tri monatoj tute ne pluvis (= επί τρεις μήνες καθόλου δεν έβρεξε).
— Densa neĝo falis kaj kovris la tegmentojn de la urbo (= πυκνό χιόνι έπεσε και σκέπασε τις στέγες της πόλης).
— Dika tavolo da neĝo kovris la tutan regionon, tiel ke ĉio aspektis blanka (= χοντρό στρώμα χιονιού σκέπασε όλη την περιοχή, έτσι που όλα φαίνονταν άσπρα).
— Dum la tuta nokto neĝis senĉese (= όλη τη νύχτα χιόνιζε ασταμάτητα).
— Estis tiel densa nebulo, ke oni povis nenion vidi antaŭ si (= ήταν τόσο πυκνή ομίχλη, που δεν μπορούσε κανείς να δει τίποτα μπροστά του).

---

* Από τα ουσιαστικά **nebulo, pluvo, fulmo, hajlo, neĝo, frosto**, σχηματίζονται τα αντίστοιχα ρήματα, που όπως και στα Ελληνικά χρησιμοποιούνται απρόσωπα για να εκφράσουν ρηματικά το φαινόμενο (**nebulas** = έχει ομίχλη, **pluvas** = βρέχει, **fulmas** = αστράφτει, **hajlas** = κάνει [ρίχνει] χαλάζι, **neĝas** = χιονίζει, **frostas** = κάνει [έχει] παγετό).

— Nepenetrebla nebulo etendiĝis sur la tuta urbo (= αδιαπέραστη ομίχλη απλώθηκε πάνω σ' όλη την πόλη).
— Sur la plej altaj pintoj de la montoj estas eternaj glaĉeroj (= πάνω στις πιο ψηλές κορυφές των βουνών είναι αιώνιοι παγετώνες).
— En la nordaj regionoj de la lando frostas dum la tuta vintro (= στις βόρειες περιοχές της χώρας κάνει [έχει] παγετό κατά τη διάρκεια όλου του χειμώνα).
— Tondris kaj brilaj fulmoj lumigis la ĉielon (= βρόντησε και λαμπερές αστραπές φώτισαν τον ουρανό).
— Forta fulmo batis la plej altan tegmenton de la vilaĝo (= δυνατός κεραυνός χτύπησε την πιο ψηλή στέγη του χωριού).
— Fulmoj kaj tondroj anoncis la alvenon de la ŝtormo (= αστραπές και βροντές ανάγγειλαν τον ερχομό της θύελλας).
— En mia vilaĝo tre ofte regas frosto (= στο χωριό μου πολύ συχνά επικρατεί παγετός).
— Neatendita hajlo difektis la tutan rikolton (= αναπάντεχο χαλάζι χάλασε όλη τη σοδειά).
— Falis tiel dika hajlo, ke oni opiniis, ke ŝtonoj falas de la ĉielo (= έπεσε τόσο χοντρό χαλάζι, που νόμιζε κανείς ότι πέτρες πέφτουν από τον ουρανό).
— Densaj grizaj nuboj kovris la tutan ĉielon (= πυκνά γκρίζα σύννεφα σκέπασαν όλο τον ουρανό).
— Blankaj nuboj flugis sur la ĉielo (= λευκά σύννεφα πετούσαν στον ουρανό).

ΓΝΩΣΤΕΣ — ΑΓΝΩΣΤΕΣ ΛΕΞΕΙΣ

(συνέχεια από το προηγούμενο μάθημα)

ŝoki = σοκάρω
ŝovinismo = σωβινισμός
ŝovinisto = σωβινιστής
tabuo = ταμπού
tamburo = ταμπούρλο, τύμπανο
taro = τάρα, απόβαρο
teknokrato = τεχνοκράτης (**-ιο** = τεχνοκρατία)
telegrafo = τηλέγραφος
telegramo = τηλεγράφημα
telepatio = τηλεπάθεια
teleskopo = τηλεσκόπιο
telfero = τελεφερίκ
tenajlo = τανάλια

tenoro = τενόρος
teologo = θεολόγος (**-ιο** = Θεολογία)
teorio = θεωρία
termito = τερμίτης
testo = τεστ
tifono = τιφώνας
tigro = τίγρης
tirano = τύραννος
toasto = τοστ
toksino = τοξίνη
tono = τόνος (Μουσ.)
topografo = τοπογράφος (**-ιο** = Τοπογραφία)
torto = τούρτα
totemo = τοτέμ
traĥeo = τραχεία
tramo = τραμ
traŭmato = τραύμα
trigonometrio = Τριγωνομετρία
troglodito = τρωγλοδύτης
trono = θρόνος
trumpeto = τρουμπέτα
tulipo = τουλίπα
tunelo = τούνελ
turbano = τουρμπάνι
turbino = τουρμπίνα, στρόβιλος
turneo = τουρνέ
uretro = ουρήθρα
utopio = ουτοπία
valvo = βαλβίδα
varieteo = βαριετέ
veluro = βελούδο
vermuto = βερμούτ
veterano = βετεράνος, παλαίμαχος
virtuozo = βιρτουόζος, δεξιοτέχνης
viskio = ουίσκι
vitamino = βιταμίνη
vitriolo = βιτριόλι
zebro = ζέβρα
zefiro = ζέφυρος
zenito = ζενίθ
zono = ζώνη

LEKSIKO

aperi = εμφανίζομαι
aŭtoro = συγγραφέας
bindi = βιλιοδετώ
bulteno = φυλλάδιο
dikti = υπαγορεύω
disponi = διαθέτω
ekskuzi = δικαιολογώ
emocii = συγκινώ
envii = φθονώ, ζηλεύω
gardi = φυλάω
gesto = χειρονομία, νεύμα
hejti = θερμαίνω χώρο
indiĝeno = ντόπιος, ιθαγενής
indiki = υποδεικνύω
indulgi = είμαι επιεικής
interna = εσωτερικός
kanzono = τραγούδι
komisii = αναθέτω
kondolenci = συλλυπούμαι
konfuzi = μπερδεύω, συγχέω
konscii = συναισθάνομαι, συνειδητοποιώ

kontinua = συνεχής, αδιάκοπος
kruda = ωμός, τραχύς
kruela = άπονος, σκληρός
kurso = σειρά μαθημάτων, τμήμα διδασκαλίας
lano = μαλλί
linio = γραμμή
milda = ήπιος, πράος, ήρεμος
noti = σημειώνω
novelo = νουβέλλα, μυθιστόρημα
paĝo = σελίδα
peli = διώχνω, ωθώ
pitoreska = γραφικός
pulso = σφυγμός
ravi = γοητεύω, καταπλήσσω, προκαλώ θαυμασμό
ravino = φαράγγι, χαράδρα
rimarki = παρατηρώ
serena = γαλήνιος, ήρεμος
sopiri = αποζητώ, νοσταλγώ
supozi = υποθέτω
suspekti = υποπτεύομαι

TEKSTO

Ateno 3a de Marto

Karaj Silvi kaj Pol,

Dankon pro via afabla multpaĝa letero de la 27a de Januaro.

Kiel ordinare, nia tuta familio kore ĝuis tiun ĉi vian belan leteron, precipe la rakontadon kaj priskribadon de via rava vojaĝo al Japanio.

Dank' al tiu bela kaj detala priskribo, ankaŭ ni partoprenis kun vi la vojaĝon al tiu pitoreska, belaga kaj antikva lando.

Niaj scioj pri tiu lando estas ja abundaj, ĉar, kiel vi scias, ni havas kelkajn japanajn korespondamikojn, dank' al kies la informoj ni jam multon lernis pri ilia patrujo.

Ŝajnas tamen, ke la impresoj de fremduloj gravas pli multe.

Ni konstatas, ke vi rimarkis, per fremda, esplora okulo, vere notindajn, plej impresajn por fremdulo, elementojn, kiuj tamen estas tre ordinaraj, verŝajne ne tiel atentindaj por la indiĝenoj.

Tio memorigas al ni karan amikon el Danujo, kiu, post kvinjara kontinua korespondado kun ni, veninte en Grekujo, vizitis interalie la grandan ravinon Samaria, en la insulo Kreto. Tiu loko impresis lin plej multe el ĉiuj aliaj grekaj vidindaĵoj, kaj li ege miris, ĉar ni neniam menciis tiun grekan trezoron en niaj leteroj, en kiuj tamen ni estis jam priskribintaj al li tiom da interesaj grekaj lokoj.

Alia malnova amiko el Pollando same miris, ĉar ni neniam skribis al li pri suvlaki, la objekto, kiu plej multe lin impresis en Grekujo.

Tamen ni revenu al via vojaĝo.

Ni preskaŭ enviis[1] vin legante vian priskribon. Estas do vere, ke plej

1. Το ρήμα «**envii**» σημαίνει «φθονώ», «ζηλεύω», με την έννοια «επιθυμώ να έχω κάτι που έχει άλλος». Η ίδια λέξη «ζηλεύω», με την έννοια «νοιώθω ανησυχία ή υποψία

mirinda en tiu lando estas tiu enmiksiĝo de la antikvo kun la moderno.

Estis feliĉe, ke vi havis la eblon ne nur viziti la grandajn modernajn urbojn, sed ankaŭ la internon de la lando, kie oni povas rekte tuŝi la pulson de la popolo, ĝian viv-kaj pensmanieron, la tradicion kaj la nefalsitan kulturon de ĉiu lando.

Ni estas, same kiel vi, feliĉaj, ĉar vi faris tiun vere mirindan vojaĝon, kiun ni supozas, ke vi neniam forgesos.

Vi plendas pro la kruda vintro, kiun vi spertis ĉi-jare en via lando. Vi verŝajne tute ne povas supozi, ke en nia sunplena Ateno kelkaj aspiras[2] tiun senindulgan froston, kiu regis dum tiom da monatoj ĉe vi. Unu el tiuj estas Maria, kiu, aŭskultinte kion vi skribis pri la kruela vetero de Svislando[3], miris pro via malkontento. Laŭ ŝi, al kiu tiom mankas la neĝo, vi tute ne konscias[4], kiom feliĉaj vi devus esti, ĉar vi havas la eblon ĝui tiom da neĝo.

σχετικά με την πίστη αγαπημένου μου προσώπου» αποδίδεται στην Εσπεράντο με άλλη λέξη, το ρήμα «**ĵaluzi**».

2. Το ρήμα «**aspiri**» σημαίνει «ποθώ», με την έννοια «επιζητώ», δηλαδή «επιθυμώ πολύ να αποκτήσω κάτι, που θεωρώ πολύ καλό, όμορφο, ακριβό, υψηλό κ.λπ.».

Το ρήμα «**sopiri**» σημαίνει «αποζητώ» ή «νοσταλγώ», με την έννοια «λυπάμαι για κάτι που έχω χάσει, και νοιώθω ζωηρή επιθυμία να το ξαναβρώ ή να το ξανάαποκτήσω».

Δεν πρέπει να γίνεται σύγχυση μεταξύ των δύο παραπάνω ρημάτων και του ελληνογενούς «**nostalgii**» (**nostalgio** = νοσταλγία), που, αποδίδοντας ακριβώς τη σημασία της ελληνικής λέξης, από την οποία προέρχεται, σημαίνει «νοσταλγώ», αλλά με την έννοια «θλίβομαι από την επιθυμία να ξαναδώ την πατρίδα μου, τον τόπο μου, το σπίτι μου».

Η ελληνική λέξη «ποθώ», με την έννοια «επιθυμώ σεξουαλικά, με πάθος, σαρκικά», αποδίδεται καλλίτερα στην Εσπεράντο με το ρήμα «**deziregi**», σύνθεση του ρήματος «**deziri**» (= επιθυμώ) και του επιθήματος «**eg**».

3. Δεν πρέπει να γίνεται σύγχυση ανάμεσα στις φωνητικά κάπως συγγενείς λέξεις «**Sviso**» (= Ελβετός) και «**Svedo**» (= Σουηδός). Έτσι: Ελβετία = **Svisujo** ή **Svislando** ή **Svisio**, και Σουηδία = **Svedujo** ή **Svedlando** ή **Svedio**.

4. Το ρήμα «**konscii**» σημαίνει «συναισθάνομαι», «συνειδητοποιώ». Έτσι η λέξη «**konscio**» σημαίνει «συναίσθηση» ή «αίσθηση» ή «συνείδηση», με την έννοια «άμεση γνώση, σαφής πνευματική αντίληψη» (έχω συναίσθηση [αίσθηση, συνείδηση] της αδυναμίας μου, της αξίας μου, της ευθύνης μου, της κατάστασης, των απαιτήσεών σου, κ.λπ. = mi havas **konscion** pri mia nepovo, pri mia merito, pri mia respondeco, pri la situacio, pri viaj postuloj). Δεν πρέπει να γίνεται σύγχυση ανάμεσα στις λέξεις «**konscio**» και «**konscienco**». Η δεύτερη αυτή λέξη σημαίνει «συνείδηση» αλλά με την ηθική έννοια του όρου (έχω καθαρή συνείδηση = mi havas puran **konsciencon**, έχω ήσυχη συνείδηση = mi havas trankvilan **konsciencon**, με τίπτει [βασανίζει] η συνείδησή μου = turmentas min mia **konscienco**).

Επίσης δεν πρέπει να γίνεται σύγχυση ανάμεσα στις λέξεις αυτές και τις λέξεις «**senso**», που σημαίνει «αίσθηση» (όραση, ακοή, αφή, όσφρηση, γεύση = vidado, aŭdado, tusado, flarado, gustumado), και «**sento**», που σημαίνει «αίσθημα» (tio tuŝis miajn plej bonajn **sentojn** = αυτό άγγιξε τα πιο καλά μου αισθήματα, mi ne povas esprimi miajn

Estas kompreneble, ke Maria, pensante pri la neĝo, ĉiam sopiras[2] al la skiado, kiun ŝi abunde ĝuis, kiam ŝi gastis ĉe vi, antaŭ du jaroj.

Estas ja vere, ankaŭ ni legis tion en ĵurnaloj, ke la ĉi-jara vintro estis tre kruda en la tuta centra kaj norda Eŭropo.

Kontraŭe, en Grekujo ĉi-jare la vintro estis pli milda ol ordinare. La vetero estis preskaŭ tute serena. En Atiko tute ne neĝis, kaj en Ateno iom pluvis, dum la temperaturo restis tiel alta, ke ni tre malofte uzis en la hejmo hejtilon,[5] kaj tre malofte ni bezonis pezajn lanajn vestojn.

Ni ja bone komprenas la malfacilaĵojn, kiujn kaŭzis al vi la ĉi-vintra, eksterordinare daŭra frosto. Tamen vi estu paciencaj, ĉar, kiel la kanzono diras -ĉu vi memoras tiun belan italan kanzonon?- "La printempo baldaŭ venos, ĝi pelos la vintron, kaj ĉio en la verda urbo estos denove bela kaj brila".

La unuaj signoj de la printempo aperis jam en Grekujo, kaj ĉio montras, ke ĉi-jare ni havos vere belan Paskon.

Nia avino, "la anĝelo gardanta la familion Georgopulos", kiel vi tute trafe nomas ŝin, estas en bona stato, tamen ĉiam kun siaj ordinaraj, negravaj problemoj. Ŝi sendas al vi siajn varmajn salutojn. Ŝi bebaŭras, ĉar ŝi ne povas ankoraŭ skribi al vi propramane en Esperanto, sed ŝi promesas, ke ŝi povos fari tion baldaŭ. Tion garantias ankaŭ ŝia instruistino, Maria, kaj estas vere, ke la avino progresas. Ŝi mem diktis al ni tiujn ĉi liniojn.

---

verajn **sentojn** = δεν μπορώ να εκφράσω τα αληθινά αισθήματά μου, vi ne dubu pri miaj **sentoj** = μην αμφιβάλεις για τα αισθήματά μου).

Μερικές λέξεις, που σχηματίζονται από τις ρίζες «konsci» και «konscienc» είναι φωνητικά και εννοιολογικά συγγενείς. Πρέπει λοιπόν να προσέξει κανείς ότι:

«**senkonscia**» = αναίσθητος (που έχασε την αίσθηση, τις αισθήσεις) ενώ «**senkonscienca**» = ασυνείδητος (χωρίς συνείδηση), και «**nekonscia**» = ασυναίσθητος (με χωρίς αίσθηση).

(Li perdis la ekvilibron kaj falis **senkonscia** = έχασε την ισορροπία και έπεσε αναίσθητος, post la ŝoko ŝi restis longe **senkonscia** = μετά το σοκ έμεινε επί πολύ αναίσθητη, li estas krimulo tute **senkonscienca** = είναι κακοποιός εντελώς ασυνείδητος, li kondutis tute **senkonscience** kontraŭ siaj propraj gepatroj = συμπεριφέρθηκε εντελώς ασυνείδητα προς τους γονείς του, per **nekonscia** movo li faligis la glason = με ασυναίσθητη κίνηση έριξε το ποτήρι, li tute **nekonscie** jesis = εντελώς ασυναίσθητα συγκατένευσε).

Συγγενείς είναι οι σημασίες των ρημάτων «**senkonsciiĝi**» (= αναισθητοποιούμαι, χάνω τη συναίσθηση) και «**sveni**» (= λιποθυμώ). Επίσης συνώνυμη είναι η ελληνογενής λέξη «**lipotimii**» (από το ουσιαστικό «**lipotimio**» που σημαίνει «λιποθυμία»).

5. Το ρήμα «**hejti**» σημαίνει «θερμαίνω χώρο με ειδική γι' αυτό συσκευή» ή «βάζω σε λειτουργία θερμαντική συσκευή χώρου» (ανάβω το τζάκι, το φούρνο, τη σόμπα). Έτσι η λέξη «**hejtilo**» σημαίνει «θερμάστρα» ή «σόμπα».

Η λέξη «ανάβω», με την έννοια «βάζω σε λειτουργία ηλεκτρική συσκευή ή κύκλωμα» (ανάβω το φως, το ραδιόφωνο, το θερμοσίφωνο κ.λπ.) αποδίδεται στην Εσπεράντο με άλλη λέξη, το ρήμα «**ŝalti**».

La junuloj de la familio sendas al vi sian amon. Ili aparte skribis al Anna kaj Madelen, kun kiuj, kiel ni suspektas, ili preparas al ni ian surprizon por la somero.

Ni estas vere feliĉaj, ĉar vi decidis ferii ĉi-somere en Grekujo. La elekto de Samos estas tre bona. Ni jam skribis al vi pri tiu treege bela insulo. Aldone, ni sendas al vi ĉi-kune turismajn prospekton kaj bultenon, en kiuj vi trovos ĉian informon kaj detalan priskribon de ĉia vidindaĵo en la insulo. Kompreneble, ni mem zorgos pri ĉio, tamen vi devas, kiel eble plej baldaŭ, precizigi la daton de via alveno, ĉar, pro la ege granda turisma movado en la insulo, oni devas ĝustatempe rezervi aer- aŭ ŝipbiletojn, loĝlokon k.c.

Vi nepre antaŭvidu en via feriprogramo kelktagan, espereble multtagan, restadon en nia vilaĝo. Janis jam atendas vin kaj komisiis al ni inviti vin gasti ĉe lia propra domo -li diras, ke ĝi estas pli komforta kaj pli taŭga ol la nia - kun via tuta familio, eĉ kun kelkaj viaj amikoj.

Ni mem estos en la vilaĝo de la 15a ĝis la 30a de Aŭgusto, kaj estos vere mirinde, se ni povos pasigi tiujn tagojn kune. Tamen, eĉ se vi venos en Grekujo pli frue aŭ pli malfrue, vi povos gasti ĉe Janis. Ni konsilas al vi ne perdi la okazon ĝui nian belan vilaĝon, kiun ni multfoje jam priskribis al vi detale.

Janis promesas, ke eĉ per gestoj li sukcesos kontentige gvidi vin, kaj servi kiel via ĉiĉerono.

Estas kompreneble, ke nia hejmo en Ateno estos, en ĉiu tempo, je via dispono. Post via feriado, Madelen povas kompreneble resti en Ateno, nepre ĉe ni, kiom longe ŝi volas, kaj, kiel Kostas skribis jam al ŝi, ŝi povos, helpe de Eleni, labori super sia studaĵo pri la historio de la antikva Grekujo. Ni kaptas la okazon gratuli pro la diplomiĝo de nia kara Madelen, afero, kiu prave emociis kaj igis vin fieraj.

Niaj okupoj restas ĉiam tiom variaj kaj multaj, ke tre ofte regas en nia programo vera konfuzo, ne permesanta al ni meti la aferojn en ĝusta vico.

Ni ne klopodas ekskuzi nin pro nia malfrua respondo al via lasta letero. Ni estas certaj, ke vi bone komprenas la situacion.

Interalie, antaŭ du monatoj ni decidis partopreni vesperan kurson pri bindado. Tiu arto jam antaŭ longe vekis al ni ambaŭ intereson, kaj tiel ni ne volis perdi la okazon, sekvi tiun kurson, unuafoje organizitan de la kultura domo de nia kvartalo.

Inter la libroj, kiujn ni legis lastatempe, ni aparte ĝuis esperantlingvan verkon, kiun ĉina amiko sendis al ni.

Temas pri kolekto da noveloj de la fama ĉina aŭtoro Lusin, kies neniun verkon ni estis legintaj antaŭe. Ni konsilas al vi nepre legi tiun belan libron, kies la Esperanta traduko estas verŝajne tre bona kaj fidela. Ni

estas certaj, ke vi ĝuos ĉiun linion de tiu ĉi bela verko.

Vi eble sciiĝis jam pri la malagrabla novaĵo, rilate al nia kara sveda[3] amiko Ingvar. Se ne, ni informu vin, ke antaŭ monato, post longa restado en hospitalo, mortis lia patro, la kara pastro Gustav.

Ni jam kondolencis la familion kaj la svedan Esperanto-asocion, kiu perdis unu el siaj plej bonaj membroj.

Ni dezirus multon ankoraŭ skribi al vi, karegaj amikoj, tamen ni iam devas ĉesi.

Ni atendas de vi, kiel eble plej baldaŭ, leteron, kun via preciza feriprogramo kaj indikoj pri la preparado de via restado en Grekujo. Vi tute ne hezitu peti de ni ĉion ajn.

Ni kisas kaj kore salutas vin
Evangelia-Vasilis

EKSPLIKOJ

— **ĉi-jare**, **ĉi-vintre**, **ĉi-somere** = en (dum) tiu ĉi jaro, vintro, somero.
— **ĉi-kune** = kune kun tio ĉi (kune kun tiu ĉi letero).

EKZERCOJ

α) Vi respondu al la sekvantaj demandoj, nepre uzante plenajn frazojn:

1) De kio devenas la scioj de la paro Georgopulos pri Japanio?
2) Kio plej multe impresis en Grekujo la danan amikon de gesinjoroj Georgopulos?
3) Kio estas, laŭ gesinjoroj Georgopulos, plej mirinda en Japanio?
4) Kion oni povas fari, vizitante la internon de fremda lando?
5) Kion Maria pensas pri la svisaj amikoj plendantaj pro la daŭra frosto?
6) Kia estis la ĉi-jara vintro en la norda Eŭropo, kaj kia en Grekujo?
7) Kiel la svisaj amikoj de la familio Georgopulos nomas la avinon?
8) Kial la svisaj amikoj devas frue precizigi la daton de sia alveno al Samos?
9) Pri kio nova la geedzoj Georgopulos decidis sin okupi?
10) Kiu libro aparte plaĉis al la geedzoj Georgopulos?

b) Krucvorto



Horizontale

1. Ψιχάλα
2. Παγετός (αιτιατική, αντίστροφα)
3. Αμμοθύελλα (αιτιατική)
4. Φύσημα
5. Σύννεφο / Ομίχλη
6. Θύελλα
7. Καιρός

Vertikale

1. Χαλάζι
2. Άνεμος (αντίστροφα)
3. Αστραπόβροντο
4. Φυσάει
5. Βροντάει
6. Νιφάδα
7. Ασυννέφιαστος
8. Βροχή
9. Αστραπή (ακατάληκτο)

c) Vi kompletigu la vortojn laŭ la donata signifo:

1) sol _____ (επίσημος, γλώσσα-ψάρι, στερεός, αλληλέγγυος, διαλύω)
2) spe _____ (είδος, ειδικός, καθρέφτης, βλέπω θέαμα, σπέρμα, έμπειρος, συναλλαγή)
3) sta _____ (πάγκος, σταθμός, στάδιο, στατιστική)
4) stu _____ (σπουδάζω, φοιτητής, στούντιο, χαζός)
5) sub _____ (ξαφνικός, ουσιαστικό, αφαίρεση)
6) suf _____ (υποφέρω, αρκετός, πνίγω, επίθημα)

7) ŝmi _____ (μακιγιάρω, αλείφω)
8) ŝul _____ (οφείλω, ώμος)
9) tap _____ (ταπετσαρία, χαλί)
10) tea _____ (ομάδα, θέατρο)
11) tele _____ (τηλέφωνο, τηλεγράφημα, πιάτο)
12) temp _____ (ιδιοσυγκρασία, θερμοκρασία, κρόταφος)
13) ten _____ (σκηνή, τρυφερός, τενόρος, πειρασμός)
14) ter _____ (ταράτσα, θερμόμετρο, φταρνίζομαι, τρόμος)
15) trad _____ (μεταφράζω, παράδοση)
16) tran _____ (κόβω, ήσυχος, συναλλαγή)
17) tro _____ (τρόλλεϋ, θρόνος, βρίσκω)
18) tru _____ (επιβάλλω, κορμός)
19) un _____ (νύχι, αλοιφή, παγκόσμιος, πανεπιστήμιο)
20) ur _____ (πόλη, ουρώ)
21) val _____ (ισχύων, βαλίτσα, αξίζω, συνάλλαγμα)
22) ven _____ (πουλάω, Παρασκευή, δηλητήριο, νικώ, άνεμος, κοιλιά)
23) ver _____ (ρήμα, πράσινος, έργο πνευματικό, χύνω, κάθετος)
24) viz _____ (πρόσωπο, επισκέπτομαι)

ĉ) Vi traduku en Esperanton la jenan tekston:

«Με καταδικάσατε όχι γιατί μου έλειψαν τα επιχειρήματα, αλλά γιατί μου έλειψε το θάρρος και το θράσος, και γιατί δεν θέλησα να σας πω αυτά που με ευχαρίστηση θα ακούγατε, αν θρηνούσα και ικέτευα ή φερόμουν ανάξια στον εαυτό μου, όπως βέβαια εσείς συνηθίσατε να ακούτε από άλλους. Όμως ούτε τότε θεώρησα ότι θα έπρεπε, λόγω του κινδύνου, να κάνω κάτι ανάξιο σε ελεύθερο άνδρα, ούτε τώρα μετανοώ, που απολογήθηκα με αυτό τον τρόπο. Αντίθετα, προτιμώ να πεθάνω επειδή απολογήθηκα έτσι, παρά να ζω γιατί θα είχα απολογηθεί με άλλο τρόπο. Γιατί είτε σε δίκη είτε σε πόλεμο, ούτε εγώ, ούτε άλλος άνθρωπος δεν πρέπει να σκέπτεται να αποφύγει το θάνατο με κάθε τρόπο. Γιατί πράγματι, πολλές φορές στις μάχες είναι φανερό ότι μπορεί κανείς πιο εύκολα να αποφύγει το θάνατο, αν εγκαταλείψει τα όπλα και φύγει, ή αν κάποιος ικετέψει τους αντιπάλους του. Και σε κάθε κίνδυνο, είναι πολλοί τρόποι με τους οποίους μπορεί κανείς να αποφύγει το θάνατο, αν τολμάει να λέει και να κάνει ό,τι δήποτε»

(Πλάτωνα «Απολογία του Σωκράτη»)

---

kondamni = καταδικάζω
armi = οπλίζω
aŭdaci = τολμώ

d) Uzante la donatajn radikojn kaj taŭgajn afiksojn, prepoziciojn aŭ aliajn radikojn, vi formu en Esperanton la petatajn vortojn:

1) sekv-	(ακολουθία, επακόλουθο)
2) kompren-	(παρεξηγώ, κατανοητός, μισοκαταλαβαίνω, υπονοώ, αλληλοκατανόηση)
3) trov-	(εύρημα, ανακάλυψη, βρίσκομαι, ξαναβρίσκω)
4) ter-	(προσγειώνομαι, θάβω, υπόγειος, υπέργειος, επίγειος)
5) kor-	(άκαρδος, καλόκαρδος, εγκαρδιότητα)
6) kur-	(προστρέχω, δρομέας, κυνηγώ)
7) pren-	(αγκαλιάζω, αφαιρώ, συμμετέχω, ξαναπαίρνω)
8) vort-	(με άλλα λόγια, λεξίδιο, κατά λέξη, μονολεκτικά, σταυρόλεξο, λεξικό)
9) riĉ-	(υπέρπλουτος, φτωχαίνω, φτώχεια, νεόπλουτος)
10) rid-	(χαμόγελο, γελοίος, γελοιοποιώ)
11) loĝ-	(κατοικία, εγκαθίσταμαι, μετακομίζω, πολυκατοικία, κατοικήσιμος, πληθυσμός)
12) port-	(φορητός, μεταφέρω)
13) am-	(φιλόμουσος, ερωτεύομαι, αξιαγάπητος, ζωόφιλος)
14) manĝ-	(κολατσιό, προγευματίζω, γευματίζω, δειπνώ, παμφάγος, φαγώσιμος, ταΐζω)

e) Krucvorto



Horizontale

1) Li partoprenas la regadon de ŝtato, kiel membro de la plej alta tiacela organizaĵo / Estas ĉio ekzistanta (senfinaĵe).
2) Montra pronomo (returnite) / Zorgi por evitigi malbonon aŭ danĝeron, ŝirmi (senfinaĵe) / Multon scianta, edukita.
3) Ĝia alto dependas de la varmo / Posedigi, havigi (returnite).
4) Ĉambro, loko destinita por, ordinare infana, amuzado.
5) Sin konformi al ordono aŭ konsilo (senfinaĵe) / Subite sin montri al ies vidado, evidentiĝi (preterite) / Sporti sur neĝo.
6) Eco de persono meritanta respekton kaj amon / Restaĵo de brulaĵo (senfinaĵe).
7) Valora metalo / Siroko estas tio.
8) Plej ordinara, homa nutraĵo (senfinaĵe) / Devas esti ĉiu kuristo.
9) Ĝi montras elementon / Ordinara forirejo / Ekposedi, ekhavi (returnite).
10) Ĝi estas ankaŭ konstelacio (returnite) / Malvarmego.
11) Ĝi montras komenciĝon / Juvelŝtono (returnite, senfinaĵe) / Vorteto difinanta ĉian sekson.
12) Parto de homa membro / Linio dividanta kampojn, landojn k.a. / Limigita etendaĵo da akvo (returnite, senfinaĵe).
13) Ĉarma, entuziasmiga, surpriza / Havi ion tute propran / Interjekcio esprimanta malesperon.
14) Bone fermi (returnite) / Ĝi montras kolekton / La unua nutraĵo de la homo (returnite).
15) La konsonantoj de doto / Esprimo postulanta obeon (returnite) / Duona bato.
16) Samaj vokaloj / Ĵus aperinta, antaŭe ne ekzistanta aŭ nekonata / Teraltaĵoj.

Vertikale

1) La nigra oro / Ekĝoji, ekesprimi ĝojon aŭ kontenton.
2) Lasi ion por pli malfrua tempo.
3) Io facile dispeciĝanta / Somera frukto.
4) Parto de la buŝo (senfinaĵe) / Apartenanta aŭ partoprenanta neniun el du aŭ pli multaj interbatalantaj aŭ malsimilaj flankoj (akuzative).
5) Loĝanto de Eŭropa ĉefurbo / Plej taŭga por la produktado de vintraj vestaĵoj.
6) Ie forgesita aŭ pro diversaj kialoj ne plu posedata / Respektinda parenco (senfinaĵe).
7) Homa rajto aŭ simple eco de tute similaj inter si aĵoj, aferoj, homoj k.t.p. / Ne iu alia.
8) La tutaĵo de ĉio ekzistanta sur la tero aŭ nia tero rigardata kiel vivejo / Ĝi montras ripeton / Prepozicio montranta kaŭzon.

9) Devige akceptigi ion al iu / Instrumento produktanta alttonan sonon / Ĝi malakceptas.
10) Preciza domloko / Homo kies ĉefa okupo estas la gardado de domo.
11) Plurala finaĵo / Persona pronomo / Ĝi montras inklinon (returnite) / La konsonantoj de domo.
12) Numeralo / Montri dormemon aŭ enuon (preterite) / Tiu de la floroj estas bela.
13) Ĝi montras nur viron / Kinematografio / Mallonge aŭ provizore skribi (returnite)
14) Li ĝuas la tutan gloron (senfinaĵe) / Nedifina pronomo.
15) Elemento, plej malgranda peceto / Filo / Necesa en la banĉambro.
16) Tute necesa por la plejmulto da veturiloj, transportiloj k.s. / Ili staras aŭ moviĝas unu flanke de la alia en egala inter si distanco.

ΜΑΘΗΜΑ 40ο

LEKSIKO

akra = αιχμηρός, κοφτερός, οξύς
amori = αισθάνομαι σεξουαλική ροπή
apenaŭ = μόλις
difekti = χαλάω, καταστρέφω
elasta = ελαστικός
epilogo = επίλογος
fero = σίδηρος
fleksi = κάμπτω
fondi = ιδρύω
genio = ιδιοφυΐα
humana = ανθρωπιστικός
inko = μελάνι
instinkto = έντστικτο
jubileo = ιωβηλαίο
kateno = δεσμά
knedi = ζυμώνω, πλάθω
krei = δημιουργώ
laŭta = ηχηρός, δυνατός σε ήχο
makulo = κηλίδα, λεκές
materio = ύλη
menso = νους, διάνοια
negativa = αρνητικός
nuanco = απόχρωση
oficiala = επίσημος, έγκριτος
percepto = αντίληψη
pesi = ζυγίζω (μετ.)
planedo = πλανήτης
profeto = προφήτης
provi = δοκιμάζω
puŝi = σπρώχνω, ωθώ
rabi = ληστεύω
rara = σπάνιος
raso = φυλή, ράτσα
remi = κωπηλατώ
spaco = διάστημα
specio = είδος, κατηγορία
stoko = απόθεμα, στοκ
strukturo = δομή
substanco = ουσία
ŝanceli = ταλαντεύω, κλονίζω
ŝiri = σχίζω
tabulo = τάβλα, πίνακας
taksi = εκτιμώ, ταξινομώ, αξιολογώ
teksi = υφαίνω
tordi = συστρέφω
tubo = σωλήνας
turmenti = βασανίζω
unika = μοναδικός
velki = μαραίνομαι

TEKSTO-EPILOGO

Kara leganto,

Vi, kiu nun legas tiun ĉi tekston, la epilogon de tiu lernolibro pri la internacia lingvo Esperanto, bone jam scias, ke la valora tempo, kiun vi dediĉis al la studado de tiu ĉi lingvo, estis ne vane malŝparita.

Se vi sufiĉe diligente studis, se vi sufiĉe atente pritraktis la enhavon de tiu ĉi libro, vi nun scias, sufiĉe kontentige, ankoraŭ unu lingvon.

Vi jam bone scias, ke tiu ĉi lingvo estas same riĉa kiel ĉiu ajn nacia lingvo. Vi ankaŭ bone scias, ke tiu ĉi lingvo estas io vere ne ordinara.

En la daŭro de la tempo, kiun vi oferis al la lernado de Esperanto, vi povus lerni nur kelkajn elementojn de alia lingvo. Vi do scias, ke Esperanto, kompare kun la naciaj lingvoj estas treege pli facila, simpla kaj logika. Samtempe ĝi estas ja same kompleta kiel ĉiuj lingvoj.

La scioj, kiujn vi jam akiris estas multaj. Estas vere, ke vi bone jam scias preskaŭ la tutan gramatikon, la bazan strukturon de la lingvo, kaj tio donas al vi la eblon esprimi ĝuste vian penson.

Estas tamen vere, ke via vortstoko ne tute sufiĉas. Ĝi estas ja ne tute riĉa, almenaŭ ne tiom riĉa, kiom vi bezonus por tute bone kaj flue esprimi ĉion. Mankas al vi vortoj, sed estas preskaŭ certe, ke ĉiam mankos al vi vortoj, ĉar oni ja neniam povas lerni ĉiujn vortojn de fremda aŭ propra lingvo.

Tamen estas certe, ke en Esperanto, per la helpo de vortaro oni ja povas forigi ĉian sian leksikan mankon, ĉar sciante la tute simplan kaj regulan strukturon de la lingvo, oni povas tute ĝuste uzi ĉiun vorton, eĉ por la unua fojo rekontatan.

Persono do, kiu jam lernis sufiĉe bone tiun ĉi libron, devas nur pliriĉigi sian vortprovizon. La legado de esperantlingvaj libroj, revuoj kaj aliaj legaĵoj helpos en tio.

Tamen eĉ tio ne sufiĉas. Eĉ la plej profunda lernado de lingvo tute ne sufiĉas al persono, kiu hezitas kaj ne kuraĝas paroli en la ellernita lingvo.

Estas personoj, kiuj perfekte scias lingvon, kiuj povas ĉion kompreni kaj traduki, sed ili tute ne povas buŝe uzi tiun lingvon.

Al kio ja servas tia senfrukta kapablo?

Bedaŭrinde ĉia ajn lernolibro tute ne povas doni al tia studanto solvon. Oni devas mem akiri la kapablon uzi siajn lingvajn sciojn, kaj la sola vojo al tio estas la praktiko.

Oni tute ne hezitu praktiki, parolante kun aliaj personoj en la ellernita lingvo. La sola konsilo, kiun ni povas doni pri tiu afero, estas, ke «por paroli en ĉiu ajn lingvo, oni nepre devas rekte pensi laŭ ĝi».

Estas kompreneble, ke eĉ la plej genia kaj lerta cerbo neniam sukcesos

aŭtomate traduki de la propra lingvo en fremdan, ĉiun frazon formatan en la menso.

Persono do, kiu klopodos paroli en fremda lingvo pensante laŭ sia propra, nome tradukante vorto post vorto ĉiun sian frazon, neniam povos flue paroli en la fremda lingvo.

La tekniko estas simpla. Oni pensu nur tion, ke parolado estas la sona prezento ne de vortoj, sed de ideoj formataj en la menso, kaj aŭtomate esprimataj buŝe, dank' al la scio de la taŭgaj sonoj-vortoj.

Oni do devas tiujn ĉi ideojn mense kapti, rekte en la lingvon, kiun oni uzas, por aŭtomate ilin esprimi sone laŭ ĝi. Oni simple devas pensi rekte laŭ la lingvo, kiun oni deziras uzi.

Estas multaj personoj, kiuj hezitas kaj tute ne provas paroli en la ellernita lingvo, ĉar ili timas, ke ili parolos erare.

Alia do konsilo estas: «oni nepre uzu siajn multajn aŭ malmultajn lingvajn sciojn. Oni tute nehezite provu praktiki la lingvon, eĉ parolante neĝuste».

Estas kompreneble, ke tute ne gravas, se oni eraras, gravas nur tio, ke oni parolas. Vi do estu certa, ke sekvante tiun konsilon, vi mem baldaŭ konstatos, ke iom post iom vi parolos pli kaj pli ĝuste.

Ni povas certigi la studintojn de tiu ĉi libro, ke la ellernita materialo sufiĉas por ordinara interkomunikiĝo, por interŝanĝo de pensoj en la ĉiutaga, ordinara nivelo de interhoma diskutado.

Estas kompreneble, ke personoj, kiuj intencas perfektiĝi, povas helpe de aliaj libroj, kompletigi siajn sciojn. Taŭgaj helpiloj ja abundas.

Persono, kiu por la unua fojo provos paroli Esperanton, baldaŭ komprenos, ke tiu ĉi lingvo estas io ne ordinara. Tiu logika strukturo de la lingvo, ĝia elasteco kaj fleksebleco donas al ties la uzanto la impreson, ke li ne simple parolas en ia lingvo, sed ke li mem kreas kaj formas ĝin, ke li mem senĉese eltrovas novajn esprimsolvojn.

Preskaŭ ĉio en Esperanto estas logike kaj regule konstruita, kaj la abundaj ebloj, kiujn la lingvo donas al sia uzanto, por mem pluformi vortojn, por mem teksi, laŭ sia propra plaĉo kaj stilo, siajn esprimojn, donas al li tiun agrablan senton, ke li ne simple uzas ian senaniman komunikilon, sed ke li mem knedas sian propran lingvomaterialon.

Esperanto unue prezentas la praktikan solvon al la sendube grava problemo, kiu dum jarmiloj turmentas nian mondon.

Ĉar en nia mondo estas miloj da lingvoj, ĉar la ellernado de multaj linvoj estas afero ne ebla, ĉar la ellernado eĉ de unu fremda lingvo estas afero temporaba, tute ne simpla, ĉar la normala altrudo de la pli "fortaj". lingvoj negative[1] influas, kaj iom post iom difektas, aŭ almenaŭ serioze

1. Το επίθετο «**negativa**» σημαίνει «αρνητικός». Πρέπει κανείς να προσέξει ότι η

minacas la pli "malfortajn" lingvojn, ĉar finfine, malglaŭ tiuj ĉi abomenaj "ĉar" la homoj ne nur deziras, sed, en nia tiom malgranda mondo, nepre devas rekte interkomunikiĝi, Esperanto devas ja esti, ĝi devas oficiale[2] ekzisti, ĉar ĝi estas la sola solvo de la tutmonda lingva problemo.

Tamen ne gravas nur la praktika solvo. Tio kovras nur la materian flankon de la afero. Plej atentinda estas la morala flanko, ekzakte tio, ke Esperanto, tiu ĉi unika vojo al la vera interhoma komunikiĝo, estas la sola lingvo taŭga por la senpera, la tute libera kontakto inter alinacianoj. Estas kompreneble, ke tio, kio igas Esperanton ne nur plej taŭga, sed ankaŭ tre alloga, estas la konscio de la uzanto, ke tiu ĉi lingvo, kvankam ne gepatra estas tamen propra.

Nenia distanco ekzistas inter du alilandaj kaj alilingvaj diskutantoj, kiam ili interparolas en Esperanto.

Tio, ke la uzata lingvo same apartenas al ambaŭ, tio, ke tiu ĉi lingvo estis kreita ekzakte por tia uzado, tute neniigas la normalajn diferencojn inter alirasaj, alilingvaj, eble alikoloraj interparolantoj.

Tiel, kiel oni tute senhezite, senpripense kaj instinkte kontaktiĝas kun siaj samlandanoj, parolante kun ili en la komuna gepatra lingvo, same rekte kaj libere oni komunikiĝas kun fremduloj, pere de tiu ĉi ankaŭ komuna kaj propra lingvo.

Ekzakte tion celis la kreinto de la internacia helpa lingvo. Oferi al la homoj taŭgan rimedon, per kiu ili rekte alproksimiĝos unu al la alia, kaj, tute libere, kvazaŭ samlandanoj, interkomunikiĝos.

Tia, kaj nur tia, komunikiĝo povas forpuŝi ĉian sindetenon kaj heziton, ĉar nur dank' al tia kontakto oni povas klare vidi, ke tiuj homoj, kiujn oni konsideras «fremdaj» - ĉar ili vivas en aliaj lokoj, ĉar ili parolas fremdajn lingvojn, ĉar ili havas aliajn morojn kaj kutimojn, aliajn religiojn kaj kelkafoje alian haŭtkoloron kaj trajtojn, ĉar ili vivas laŭ diferencaj sociaj, politikaj, ekonomiaj kaj aliaj sistemoj - estas tute ne "fremdaj" Oni klare konstatos, ke tiuj "fremduloj" estas simple homoj. Homoj kun kelkaj apartaj karakterizaĵoj, tamen homoj similaj al ni, estaĵoj apartenantaj al la sama kiel ni specio[3].

αντίθετη έννοια της λέξης αυτής δεν σχηματίζεται με το πρόθημα **mal**, αλλά αποδίδεται από άλλη λέξη, την «**pozitiva**» (= θετικός).

2. Το επίθετο «**oficiala**» σημαίνει «επίσημος» με την έννοια «αναγνωρισμένος, εγκεκριμένος από υπεύθυνη αρχή» (επίσημο όργανο, επίσημος διορισμός, κανονισμός, διακήρυξη κ.λπ.).

Η λέξη «**solena**» σημαίνει κι αυτή «επίσημος», με την έννοια «εθιμοτυπικός, που χαρακτηρίζεται από επισημότητα, σοβαρότητα, πολυτέλεια κ.ά. (επίσημο ένδυμα, δείπνο, χορός, λειτουργία, ακρόαση κ.λπ.).

Η παρατήρηση γίνεται γιατί στα Ελληνικά και για τις δύο περιπτώσεις χρησιμοποιείται η ίδια λέξη «επίσημος».

3. Η λέξη «**specio**» σημαίνει «είδος» με την έννοια «κατηγορία, συνομοταξία, οικογέ-

Ili havas similajn, preskaŭ samajn interesojn. Ili, same kiel ni, suferas kaj doloras, feliĉiĝas kaj ĝojas, amas kaj amoras, penas kaj kreas. Ili havas la samajn, kiel ni, sentojn kaj bezonojn.

Milionoj da sciencistoj oferis sian tutan vivon al la metoda esplorado de la naturo, ĉar unua principo kaj plej normala intereso de la homo estas ja la ellernado de la naturaj leĝoj.

Oni jam malkovris kaj eksplikis preskaŭ ĉiujn surterajn sekretojn, ĉiujn naturajn fenomenojn. Oni jam esploris kaj ekzamenis ĉion, kio koncernas la vivon sur nia planedo. Tereno sufiĉe jam esplorita estas nun la ekstertera spaco.

Ĉu tio ĉi sufiĉas? Ĉu sufiĉas al la homoj, ke ili jam studis la ecojn de ĉia substanco, la vivon de ĉia, eĉ de la plej rara ekzistaĵo, kiam ili ankoraŭ ne povis ĝuste, "de interne" studi sian propran specion?

Ŝajnas, ke io mankas. Estas evidente, ke la observado "de malproksime" tute ne taŭgas. En tiu afero oni bezonas nek mikroskopon nek teleskopon, sed nur vastan percepton, malfermitan koron kaj precipe taŭgan komunikilon. Tiu ĉi komunikilo tute ne mankas. Ĝi estas antaŭ niaj okuloj. Kiu povas tion rifuzi?

Nun, kiam tiuj ĉi linioj estas skribataj, Esperanto travivas sian centjaran jubileon.

En la daŭro de tiuj ĉi malfacilaj cent jaroj, makulitaj de du mondmilitoj, la ideo pri la enkonduko de la komuna, internacia lingvo en nian mondon, ne velkis, sed kontraŭe plifortiĝis. En tiuj unuaj cent jaroj la Lingvo Internacia evoluis kaj perfektiĝis, tiel ke ĝi nun prezentiĝas tute senmanka, tute kompleta kaj taŭga.

Tiu ĉi periodo de cent jaroj ŝajnas longa, tamen ĝi estas nur momento en la kontinua evoluo de la homa historio kaj kulturo. Oni ja povas, kun plena certeco antaŭvidi, ke ĉu post dek, ĉu post cent aŭ kvincent jaroj, la homoj nepre detruos Babelon, ili nepre deŝiros[4] la floron, kiu odoras antaŭ iliaj nazoj.

νεια», δηλαδή δηλώνει την υποδιαίρεση ζωϊκού ή φυτικού γένους (ο παπαγάλος ανήκει στην κατηγορία —είδος— των ψιττακιδών, ο χαμαιλέων στην κατηγορία —είδος— των χαμαιλεοντιδών κ.λπ.).

Η λέξη «**speco**» είναι εντελώς άλλη και σημαίνει απλά «είδος», δηλαδή δηλώνει σύνολο όντων ή πραγμάτων με κοινές χαρακτηριστικές ιδιότητες (είδος ποτού, τι είδους άνθρωπος είναι;, διάφορα είδη καλλυντικών, φαγητών, εμπορευμάτων κ.λπ.).

Δεν πρέπει επομένως να γίνεται σύγχυση ανάμεσα στις δύο αυτές λέξεις.

4. Το ρήμα «**ŝiri**» σημαίνει «σχίζω» και αποδίδει ακριβώς την έννοια της ελληνικής αυτής λέξης και κυριολεκτικά (σχίζω το χαρτί, τα ρούχα μου = mi **ŝiras** la paperon, miajn vestojn) και μεταφορικά (μου σχίζεις την καρδιά, σχίζω τα κύμματα = vi **ŝiras** al mi la koron mi **ŝiras** la ondojn).

Όμως, η λέξη «**ŝiri**» στην Εσπεράντο έχει ακόμα την έννοια «με βία τραβάω και αποσπώ», έννοια που στα Ελληνικά αποδίδεται με διάφορες λέξεις, όπως «ξεριζώνω»,

La elpensinto kaj fondinto de Esperanto, la humana polo Lazaro Ludoviko Zamenhof (1859-1917) skribas:

"...La homoj vivas per vivo konscia, kaj senĉese celadas al sia bono. Tial, se ni scias, ke tiu aŭ alia afero promesas al la homoj grandegan kaj senduban utilon, kaj de ĝi estas por ili atingebla, ni ĉiam kun plena certeco povas antaŭdiri, ke de tiu momento, kiam la homoj nur ekturnis sian atenton al tiu ĉi afero ili jam obstine celados al ĝi, ĉiam pli kaj pli, kaj ili ne ĉesos en sia celado, ĝis ili atingos la aferon.

Se du homaj grupoj estas disigitaj unu for de la alia de rivereto, sed ili scias, ke por ili estus tre utile komunikiĝi inter si, kaj ili vidas, ke tabuloj por la kunigo de ambaŭ bordoj kuŝas tute pretaj apud iliaj manoj, tiam oni ne bezonas esti profeto, por antaŭvidi kun plena certeco, ke pli aŭ malpli frue tabulo estos metita trans la rivereto, kaj komunikiĝo estos aranĝita.

Estas vere, ke pasas ordinare kelka tempo en ŝanceliĝado. Tiel estis kun ĉiu utila ideo, tiel estis kun ĉiu utila elpensaĵo, tamen apenaŭ la homoj venis al senduba konkludo , ke la donita afero estas tre utila kaj samtempe efektivigebla, ili povis ĉiam scii antaŭe, ke pli aŭ malpli frue la afero nepre estos akceptita, ĉar tion ĉi garantias ne nur la natura inteligenteco de la homaro, sed ankaŭ ĝia inklino al sia praktika bono kaj profito..."

Kara leganto,

Estas kompreneble ke vi, pli multe ol ĉiu ajn neinformita persono, povas havi propran, klaran ideon pri la Lingvo Internacia kaj pli ĝuste kaj juste taksi[5] ĝian valoron.

Vi kredeble baldaŭ gustumos kaj rekonos la utilon, kiun Esperanto povas oferi al vi. Vi kredeble baldaŭ havos la okazon praktike uzi viajn

---

«τραβάω», «βγάζω» κ.α. (mi **ŝiras** la denton = τραβάω, βγάζω το δόντι, oni **ŝiris** lian okulon = του έβγαλαν το μάτι, li **ŝiris** al mi la harojn = μου τράβηξε, ξερίζωσε τα μαλλιά κ.λπ.). Η έννοια αυτή του ρήματος «**ŝiri**» αποδίδεται ακόμα πιο εύστοχα, όταν το ρήμα χρησιμοποιείται σε σύνθεσή του με την πρόθεση **el** (= εκ, από μέσα). Έτσι: mi **elŝiras** denton = εξάγω δόντι, mi **elŝiris** bulbon el la tero = ξερίζωσα βολβό από τη γή, oni **elŝiris** ilin el ilia patrujo = τους ξερίζωσαν —απόσπασαν— από την πατρίδα τους. κ.λπ.

Το ρήμα «**ŝiri**» έχει επίσης την έννοια της ελληνικής λέξης «κόβω», σε ότι αφορά τα λουλούδια, φύλλα κ.λπ. (mi **ŝiris** ruĝan rozon = έκοψα κόκκινο τριαντάφυλλο, mi **ŝiris** branĉeton = έκοψα κλαδάκι, κ.λπ.). Η έννοια αυτή του ρήματος «**ŝiri**» αποδίδεται ακόμα πιο εύστοχα, όταν το ρήμα χρησιμοποιείται σε σύνθεσή του με την πρόθεση **de** (**deŝiri** = αποκόβω).

5. Το ρήμα «**taksi**» σημαίνει «αξιολογώ», «διατιμώ», εκτιμώ», με την έννοια «σχηματίζω γνώμη για την αξία ενός αντικειμένου» ή «υπολογίζω την καταλληλότητα, ωφέλεια, αναγκαιότητα κ.λπ. κάποιου προσώπου ή πράγματος» (εκτιμώ τήν κατάσταση, τον κίνδυνο, τις επιπτώσεις, το εμπόρευμα κ.λπ.).

Το ρήμα «**estimi**» σημαίνει κι αυτό «εκτιμώ», αλλά με την έννοια «έχω ιδιαίτερα καλή

sciojn, kontaktante fremdajn esperantistojn. Ili estas jam sufiĉe multaj, en ĉiu angulo de nia tero. Ili, same kiel vi, iam decidis lerni Esperanton, unuj rigardante tion kiel agrablan okupadon, aliaj konciante la praktikan kaj moralan gravecon de la afero.

Vi tamen estu tute certa, ke vi ne nur iagrade lernis ian lingvon, sed, ke per tio vi metis vian propran ŝtoneton al konstruaĵo meritoplena, al kreaĵo, pri kiu la homaro rajtas esti tute fiera.

ALDONA LEKSIKO

Aldone al la tuta materialo de tiu ĉi libro, ni konsideras utile doni al la legantoj, ankoraŭ kelkajn, kredeble necesajn, nekoratajn vortojn:

absoluta = απόλυτος
aludi = υπαινίσσομαι, υποδηλώνω
ambulanco = Νοσοκομειακό όχημα
atribui = αποδίδω, καταλογίζω
aŭtoritato = αρχή, εξουσία
branĉo = κλαδί, κλάδος
brido = χαλινάρι
civilizi = (εκ)πολιτίζω
ĉerpi = αντλώ
domaĝo = κρίμα, ζημιά
ekskluziva = αποκλειστικός
eksperimento = πείραμα
fasado = πρόσοψη
fluida = ρευστός
glui = κολλάω (μετ.)
hardi = σκληραίνω (μετ.)
industrio = βιομηχανία
ĵaluzi = ζηλεύω
ĵuri = ορκίζομαι
kalumnii = διαβάλλω, συκοφαντώ
kerno = πυρήνας, κουκούτσι
konsekvenco = επακόλουθο, συνέπεια
konsoli = παρηγορώ
maŝino = μηχανή
penetri = διαπερνώ, εισχωρώ
perfidi = προδίδω
perspektivo = προοπτική
polvo = σκόνη
ponto = γέφυρα
pugno = γροθιά, πυγμή
salivo = σάλιο
seka = ξερός, στεγνός
sentimentala = (συν)αισθηματικός
ŝalti = ανάβω (φως, συσκευή κ.λπ.)
ŝelo = φλοιός, φλούδα

γνώμη για την ηθική και πνευματική αξία κάποιου προσώπου (εκτιμώ τον κύριο Α, το φίλο μου, την οικογένεια Β κ.λπ.).

Η παρατήρηση γίνεται γιατί στα Ελληνικά και οι δύο αυτές έννοιες αποδίδονται με την ίδια λέξη «εκτιμώ».

ŝnuro = σχοινί
ŝteli = κλέβω
ŝtupo = σκαλοπάτι
treni = σύρω, παρασύρω
trompi = εξαπατώ
universo = σύμπαν
vejno = φλέβα
venĝi = εκδικούμαι
veti = στοιχηματίζω
vundi = πληγώνω

EKZERCOJ

a) Vi respondu al la sekvantaj demandoj, nepre uzante plenajn frazojn:

1) Kia estas Esperanto kompare kun la naciaj lingvoj?
2) Kian eblon donas al la studantoj la ellernado de la gramatiko de Esperanto?
3) Ĉu oni povas lerni ĉiujn vortojn de fremda aŭ propra lingvo?
4) Per helpo de kio oni povas forigi siajn leksikajn mankojn?
5) Kio helpas al la pliriĉigo de la vortprovizo?
6) Kia lernolibro povas doni al studanto de fremda lingvo la kapablon buŝe uzi tiun lingvon?
7) Kiu estas la sola vojo al la akiro de parolkapablo?
8) Kiuj estas la karakterizaĵoj de Esperanto, kiuj donas al ties la uzanto la impreson, ke li mem kreas siajn esprimojn?
9) Por kio Esperanto estas la sola taŭga lingvo?
10) kio igas Esperanton tre alloga?

b) Vi metu taŭgajn demandojn al la sekvantaj respondoj:

1) La kreinto de la internacia lingvo celis oferi al la homoj taŭgan rimedon por la rekta interkomunikiĝo de alilingvanoj.
2) Jes, mi akceptas, ke Esperanto estas lingvo same riĉa kiel la naciaj lingvoj.
3) Ne, tio, ke Esperanto estas logike konstruita, igas ĝin facila.
4) Ne, mi opinias, ke mia vortprovizo ne sufiĉas, por ke mi flue esprimu en Esperanto ĉian mian penson.
5) Ne, mi opinias, ke nur internacia ligvo taŭgas por la rekta interkompreniĝo de alilinganoj.
6) Ne, mi tute ne akceptus uzi kiel internacian, iun fremdan nacian lingvon. Mi certe preferas la neŭtralan lingvon Esperanto.

7) Jes, mi akceptas, ke la enmiksiĝo de tiom multaj fremdaj vortoj en la grekan lingvon, serioze minacas ĝin.
8) Jes, mi opinias, ke Esperanto, kiel internacia lingva komunikilo, oferas grandan utilon al la homaro.
9) Jes, mi jam uzas Esperanton sufiĉe kontentige, sed mi intencas pliriĉigi miajn sciojn helpe de aliaj libroj.
10) Jes, mi estas tute certa, ke Esperanto estos iam oficiale enkondukita en la tutan mondon.

c) Vi anstataŭigu la grekajn vortojn de la sekvantaj frazoj per la respondaj vortoj de Esperanto:

1) Oni devas esti **απόλυτα** certa, ke Esperanto **θα γίνει αποδεκτή** oficiale, kiel la **μοναδική** solvo de la **παγκόσμιου** lingva problemo
2) Estas evidente, ke lia **αχαλίνωτη** ambicio **παρέσυρε** lin al konduto tute ne **αρμόζουσα** al klera kaj bone **αναθρεμένο** homo.
3) La **επίσημη** enkonduko de Esperanto en la **σχολεία** estas afero de la **Αρχών** de ĉiu lando.
